HUNGARA VIVO

5
1978
8 Ft

La kuracplantesktraktoj
de SZILAS
gardas la sanon —
pligrandigas la laborkapablon

KAMOMILO

MENTO

PAPRIKO

HISOPO

SALVIO

TIMIANO

HARGUTOJ

Szilas

Produktas:

SZILASMENTI MGTSZ

Illóolaj és Gyógynövény üzem

Kerepes H—2144

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H—1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193 H—1368
Aperas dumonate
XVIII. jaro 1978. Nro 5 (81)

ENHAVO

Fenyvesi, E.: Aŭtunaj rozoj en 1918 162
Gyóni, G.: Nur por nokto sola... (M. *Fejes*) 166
Károlyi, M.: La bienreformo (M. *Fejes*) 167
Várnai, Zs.: Ne pafu fil'... (T. *Ujlaky—Nagy*) 168
Babits, M.: Vivu la respubliko! (*V. B.*) 168
Benczik, V.: Naskiĝas nova partio 169
Barna, Z. — *Fenyvesi*, E.: Esperanto-movado dum la burĝa revolucio 170
Balbin, J.: Al la Budapesta skolo 171
Molnár, F.: La egulo (D-ro I. *Nagy*) 172
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 5. (VHZS) 174
Abonyi—Nagy, Á.: Hungara—bulgara kooperativa kontrakto per kaj en Esperanto 176
Gergely, M.: Antal Czinder 177
V. B.: Malekvilibro 178
Szenes, I.: La sola demokratia kaj praktika solvo (Intervjuo kun Jack Jones, honora prezidanto de TUCEG) (*M. F.*) 178
Farkas—Tatár, É.: Panoramo 180
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 182
Varga—Haszonits, Zs.: Internacia Interlingvistika Konferenco en Budapeŝto 183
D-ro *László*, F.: Irigacio — grava faktoro de akvoekonomio (A. *Pechán*) 184
Wiechowski, M.: Bona morto 192
Balbin, J.: Si vis pacem... 193
Ruževičius, V.: Loko por Esperanto inter naciaj lingvoj 194
D-ro *Stöp—Bowitz*, C.: Valoraj sciencaj eldonaĵoj 196
Mihalkov, G., *Fenyvesi*, E.: Recenzoj 197
Krucenigmo 199
Leterkesto, Korespondi deziras 200

Kovrilbildo de Ágnes *Lukács*

Floroj kaj armiloj...

malofte estas menciitaj kune, ja ili elvokas tre kontrastajn emociojn en la plimulto de la homoj. Aŭdante pri floroj, oni neniam pensas pri milito, kaj aŭdante pri milito, oni memoras pri suferoj, mortigado, sed ne pri la odoro de floroj. Tiuj du aĵoj tamen kunligiĝis nur antaŭ kvar jaroj denove: okaze de la sensanga revolucio en Portugalio. La revoluciaj soldatoj tie metis ruĝan klavon en la tubon de sia armilo, esprimante per tio, ke tiu armilo ne servas por mortigi.

Aŭtune en Hungario mankas klavoj, tial la simbolo de la sensanga revolucio fine de oktobro 1918 fariĝis alia floro: la *astero*, aŭ, kiel la hungara komuna lingvo nomas ĝin, la *aŭtuna rozo*.

Tiu ĉi revolucio — kiu celis fakte sole la plenan likvidon de la feŭdismo (komence de la dudeka jarcento!) — estis nur la komenco. Komenco de revolucia procezo, kiu post kvin monatoj kondukis al la fondo de la dua proleta ŝtato en la mondo. Venontjare nia lando festos la 60-an datrevenon de tiu grava historia evento, kaj per la artikoloj en tiu ĉi numero ni volas fari komprenebla por niaj legantoj la bazon, sur kiu disvolviĝis la hungara proleta revolucio.

Kompreneble, unu el la plej gravaj faktoroj estis la longa, kruela milito: la poemo de G. *Gyóni* bone sentigas, kiom la popolo abomenis ĝin. Sed ne mankis problemoj en la socio ankaŭ sen la milito: la novelo de la mondkonata Ferenc *Molnár* — kvankam per rimedoj nerektaj — majstre sentigas la strecitecon de la socia atmosfero.

Certe multaj niaj legantoj legos volonte ĉapitron el la historio de la hungara Esperanto-movado dum tiu periodo. Kompreneble ne mankas en tiu ĉi numero ankaŭ la daŭrigo de la serio pri la historio de Hungario.

Meritas nepran atenton la intervjuo kun la honora prezidanto de TUCEG, kaj ne malpli la raporto pri la Interlingvistika Konferenco, kiu okazis en Budapeŝto laŭ la invito de la Universitato „Eötvös Loránd". Interesajn ideojn lancas en sia artikolo V. *Ruzevičius*, serĉate lokon por Esperanto inter la naciaj lingvoj.

Literaturamantoj certe akceptos volonte du belajn poemojn de J. *Balbin*, kaj la fortimpresan novelon *Bona morto*. Ŝatantoj de sciencoj legu la recenzon de C. *Stöp-Bowitz* pri *Sciencaj Komunikaĵoj*, tiu ĉi tre valora frukto de la eldona agado de hungaraj esperantistoj.

Esperante, ke la enpaĝigisto ne fortondos tiujn ĉi lastajn vortojn, mi profitas la okazon averti vin pri la varbkonkurso, anoncita en nia lasta numero: ne forgesu, ke ĝi daŭros ĝis la fino de la jaro, kaj restas jam nur mallonga tempo!

AŬTUNAJ ROZOJ EN 1918

Strato en Budapeŝto je la 31-a de oktobro 1918.

REVOLUCIA ĈESIGO DE LA MILITO

Sed kial ĉi sklavpopol' toleras,
kial ĉenon rompi ne ribelas?
Ĉu atendas, ke per graco Dia
rust' formordos ĝin de mano ĝia?
Miaj kantoj estas en ĉi horo
fulmofrapoj de kolera koro.

En la kvara jaro de la unua mondmilito, kiam la situacio estis jam preskaŭ ne-eltenebla en la tuta Aŭstrio-Hungario, la supra kanto de *Petőfi*[1] estis denove aktuala. Senescepte ĉiuj popoloj de tiu Monarkio jam ege abomenis la hombuĉadon, kaj forte sopiregis la pacon. La ĉenojn toleri jam neniel povis tiuj delonge subpremitaj nacioj; la ĉeĥoj kaj kroatoj jam senkaŝe esprimis volon por preni en la proprajn manojn sian sorton, igi sendependa sian nacion, forlasi la kadukan konstruaĵon de la Monarkio. La Habsburg-dinastio, tiu ses-jarcenta potenco, alvenis al la agonio.

La suno leviĝas oriente

Dum la pacnegocadoj en Brest-Litovsk, generalo *Hoffmann,* reprezentanto de la germana imperiestro *Vilhelmo la 2-a,* fiere emfazis al la soveta delegitaro: „La triumfa germana armeo staras ja *sur viaj* teritorioj!". Karakteriza argumento, kiu servis por igi la militfinon plaĉa al la interesoj de la Germaniaj grandentreprenoj, okupi Litovion, Pollandon. Responde al tiu pacrifuzo ektondris la laboristaro en la landoj de Vilhelmo kaj *Karlo,* posteulo de Francisko-Jozefo. En januaro de 1918 okazis longdaŭraj strikoj dise en tiuj landoj; en Hungario la striko estis ĝenerala dum tri tagoj. En *Kataro* (Kotor en Jugoslavio), ĉe la Adria-maro, okazis ribelo de maristoj de la Monarkia armeo, kiun kruele sufokis admiralo *Horthy,* regonto de Hungario. La severa repuŝo fare de la reĝimo, la ekzekutadoj kaj la malliberigoj, la milit-tribunaloj, ebligis prokrasti la kataklismon je kelkaj monatoj. Blindaj igis ĉi efemera rezulto la regantojn, kvankam la soldat-ribeloj daŭre ampleksiĝis. La printempo alportis malvenkojn de la armeoj, en Nord-Italio pereis centmilo da hungaraj soldatoj. La laboristaro en Hungario denove strikis *ok* tagojn: haltis la trafiko, ne-aperis la gazetoj, la atmosfero odoris jam de revolucio. La plej grandaj fabrikoj ĉesis labori por la milito. Ĝendarmaj pafiloj murdis senarmilajn laboristojn en la granduzino MÁVAG, meze de Budapeŝto.

La manifestantoj metis gravegajn postulojn: la registaroj akceptu plej rapide la pacproponojn de la soveta registaro, oni ĉesigu la militon entute, revenigu la soldatojn hejmen. Ne malpli gravis la postulo por kontentigi la malsatantajn homamasojn. Responde la ministroj kriadis pri bolŝevika influo, kaj ili pledis por daŭrigi la militon ĝis la „fina venko". Kontraŭe, la proletaro ekvidis brilajn kaj pravajn ideojn, pli esperigajn,

en la grandega orienta imperio, kie, post du venkintaj revolucioj, disvolviĝis la potenco de la proletaro. La famo de la sovetaj disponoj, tre favoraj al la malriĉuloj kaj mizeruloj, la dividado de la bienegoj, entuziasmigis la korojn. La konfuzitaj socialdemokrataj partioj de la 2-a Internacio — kiuj alligis sin al la imperiisma milito — rapide perdis la fidon. Elirvojoj estis daŭre serĉataj laŭ la jam sukcesinta Ruslanda modelo . . .

Skuiĝas la tero

Septembro 1918: la „nevenkebla" germana armeo ekŝanceliĝas en Okcident-Eŭropo. Sude la bulgara caro (filo de la Saksa-Koburg-Gotha princfamilio) kapitulacas, la entent-armeoj okupas la Balkanon kaj atingas la limriverojn de Hungario.

Oktobro: ankaŭ sur la Italia fronto sin anoncas la bankroto: la ĉifonitaj, malsatantaj hungaraj trupoj jam nek kapablas, nek emas plu batali kontraŭ la kreskanta entent-armeo. La batalionoj ribelas unu post la alia. Budapeŝto similas al ekscitita abelujo, pugnoskuaj manifestacioj, koleregaj mitingoj sinsekve daŭras.

La regantaj klasoj, la imperiestro-reĝo neniel kapablas, eĉ per la plej ruzaj manovroj, superi la ventegon. *Naciaj konsilioj* estas kreitaj por esprimi la volon de la „sklavpopoloj", kiuj „ĉenon rompi ribelas", deklaras disiĝon de Vieno. Ankaŭ en Hungario estas kreita, fare de la opoziciaj partioj, Nacia Konsilio, ĉekape kun Mihály *Károlyi*[2], elstara kontraŭmilita politikisto.

La popolo de Budapeŝto jam ne povas atendi plu: dum unu tagnokto laboristoj kaj soldatoj amase ekmoviĝas, sensange okupas la gravajn punktojn de la ĉefurbo, kazernojn, stacidomojn, telefoncentralojn, poŝtojn. La Nacia Konsilio trovis sin, siaflanke neatendite, sur pinto de la triumfa revolucio, kies insigno, simbolo iĝis la abunde trovebla aŭtuna rozo (astero).

Kiel tiun ĉi revolucian tagon vidis ambaŭ flankoj? Tion prezentas la sekvaj du specimenoj.



Soldatoj, revenantaj de la fronto



Arkiduko Jozefo Habsburg jaron pli frue, ĉe la itala fronto

El la Taglibro de arkiduko Jozefo Habsburg

La 30-an de oktobro eksplodis la ŝtormo! La aĉaj ondoj superŝutis mian kapon. La trupoj plejparte jam aliĝis al la revoluciuloj. Vane mi vokis telefone la plej fidindajn batalionojn, ili rifuzis subteni min . . . Generalo Lukachich (lukaĉiĉ) raportas, ke li preparas armilan atakon kontraŭ la rebelintok stratoj kaj kazernoj. Tamen li aldonas, ke sukceson de tiaj atakoj li neniel povas garantii, ĉar ĉiuj trupoj, eĉ la Bosniaj, estas plene laciĝintaj, malsataj, kaj simpatias al la revolucio, konsentas kun ĝi . . .

Mi ordonas al Lukachich ne ataki, nur defendi sin. Tra la staroj oni ja tumultas kaj leviĝas, la soldataron altiras, ĉiuminute novaj kaj novaj trupoj aliĝas al ili, al la revolucio. Estus do frenezaĵo ataki kontraŭ ducent mil armitaj, revoluciigitaj laboristoj per niaj restintaj kelkaj, feblaj batalionoj . . . La tutan nokton mi sidis apud la telefono . . .

La 31-a de oktobro, 4-a horo matene: ni estas izolitaj, niaj telefonoj elŝaltitaj, restis nur la sekreta linio al Vieno. Per tiu mi vokis la mirajistrojn, poste la reĝon mem. Mi informis ilin, ke la revolucio ekflamis . . . Lia reĝa moŝto konfidis al mi la plenpotencon; mi urĝe vokis — kvankam ege malfacile — grafon Károlyi tuj veni en mian palacon . . . En la proksimaĵo ade kreskis la kriado kaj la tumultoj. Venis Lukachich kaj raportis, ke la trupoj disiĝis, eĉ liaj lastaj du balationoj, sekve li estas tute senpova kontraŭ la armita laboristaro . . . La homamaso jam plenigas la Sankt-Georg-placon de Buda-burgo, la bruego manifestas senpaciencon. Mi alsendis iun heroldi, ke mi ĵus komisiis registarĉefo grafon

Károlyi. Kiel ŝtormo de maro, tiel muĝadis la sovaĝa, ĝojplena aklamo. Eĉ nia lasta bataliono de Bosnianoj entuziasme vivuis kaj ĵivio-is min pro tiu ĉi cedemo. Kiaj furiozaj ovacioj akompanis la forirantan grafon Károlyi! Estis la 8-a horo matene. La unua nokto de la revolucio pasis . . .

En la ĉefurbo ĉiudirekten kuras aŭtomobiloj, ornamitaj per blankaj aŭtunrozoj; en ili soldatoj kaj junuloj, ĉiuj portas en butontruo kaj sur ĉapelo la blankan, senpekan aŭtunrozon de la revolucio. Oni senĉese kantas, gaje-ĝoje pafadas en la aeron, kaj kriadas: „Vivu la respubliko! . . .”

(Vol. VII., Budapest, 1934. p. 572. kc.)

„Proklamu prezidento de la respubliko Mihály Károlyi” Li staras antaŭ la enirejo de la Parlamentejo.

Revolucia afiŝo.

La potenco falis en la manojn de burĝa registaro, prezidata de Mihály Károlyi. En la registaro ricevis lokon — unuafoje en la hungara historio — du socialdemokrataj ministroj. Ne sukcesis do la tradicia regado-maniero de la multnacia Monarkio, fremdlingvajn soldatojn peli kontraŭ la loĝantaro. Renoma burĝa ĵurnalisto skribis pri tio la sekvajn:

Jenő Benda: Jen la frateco

. . . Dum la grandaj tagoj prezentis al mi la plej homecan plezuron vidi tion, ke en la revolucia deliro tiuj popoloj, kiuj ĝis tiam estis pikaj kaj murdemaj malamikoj unu al la alia, rekonsciiĝis almenaŭ portempe je sia frateco. En la olda, tradicia, tamen provoke moderna Prago, obstinkapaj, sobraj hungaroj rifuzis la obeadon, kaj ne pafis al la liberecon postulanta popolo de la ĉeha ĉefurbo. Pro tio la ĉehoj, kiuj ĝis tiam rigardis la tie troviĝantajn hungarojn per insida malamo, dece al solduloj de subpremantoj, nun vivuis niajn soldatojn kaj surstrate ĵetis florojn antaŭ ilin. Poste en Budapeŝto: ankoraŭ merkrede ĉiuj esperoj de la reakcia reĝimo apogis sin al la Bosniaj trupoj. Kaj ĵaŭde, kiam la tuta ĉefurbo estis ebria de la ĝojo, pro la sensanga revolucio, tiuj samaj Bosnianoj amase iris al la stacidomoj por hejmenveturi, feliĉaj, libere spirantaj post la animakorpa sklaveco, kaj ili vivuis la hungarojn, la sukcesan hungaran revolucion. Kaj fine, la trupoj de ĉehoj, adiaŭante al niaj provincaj urboj, lasis sin akompani al la fervojstacioj kun muziko de la hungara himno. Ankaŭ ili vivuis la revolucion, kiun subpremi estis origine ilia devo . . .

La soldatoj forigas de sur la ĉapeloj la imperiestran insignon . . .

(La triumfa revolucio, Budapest, 1918.)

Kien plu?

Meze de novembro Hungario sendependigis sin kaj estis proklamita la respubliko. Popola respubliko, kvankam la potencon kaptis la burĝaro. La konsternitaj ĝentilhomoj, aristokratoj kaj ĉiaspecaj grandsinjoroj, ĉefpastroj, mem arkiduko Jozefo kuris al la Nacia Konsilio por ke ĝi akceptu iliajn ĵurojn pri fideleco. Okazis ia kompromiso inter la nova kaj la malnova reĝimoj, kio komprenigas, kial la atendoj de la popoltavoloj nur iomete realiĝis. Biendivido efektiviĝis nur en leĝo — sole Károlyi ekdividis sian propran bienon —, la proletaro restis senŝanĝe proletaro, la armisticon nove-denove rompis la aliancanoj de la entento.

La iamaj registaroj daŭre subpremis la naciajn minoritatojn, kaj tiu ŝovinismo konsekvence kondukis al la separatistaj tendencoj ĉe tiuj. La nova burĝa registaro refalis al la anakronisma ideo de la teritoria integreco, al la kontraŭrevolucion helpanta ŝovinismo. La ekonomio profunde sinkis, la mizero de la popolo eĉ malboniĝis, senlaboreco furiozis.

La socialdemokrata partio dividiĝis. *La desktra flanko* estis tre kontenta pro siaj du ministroj; la pozicio en la registaro, tiu malnova sopiro nun atingita, forgesigis la gravegajn sociajn antagonismojn por la dekstruloj. Male, la *maldekstruloj* tute ne konsentis, ke proleta partio partoprenas en burĝa registaro, kiu kaperis la potencon surŝultre de la laboristaro. Tiu ĉi flanko volis influi la partiĉefojn, tiri ilin maldekstren, favore al la proletaj interesoj. Tiu *interna opozicio* havis profundajn radikojn kaj prezentis sin jam de jardekoj, sed nun ĝi refreŝiĝis kaj ĉiutage plietendiĝis. La novaj ideoj de Lenin, la informoj pri la Sovet-Ruslanda revolucio profunde kirlis la stagnantan akvon de la SDP.

La laboristoj de grandaj fabrikoj — en Budapeŝto kaj aliloke — prenis la uzinojn en siajn manojn, kaj deklaris ilin *socialista propraĵo!* La antaŭaj posedantoj, la fabrikposedantoj premis la registaron por kontraŭagi, reakiri la eksproprigitajn entreprenojn; la klasbatalon ade akrigis la teruriĝintaj kapitalistoj.

Mihály Károlyi

Jurnalo en urbo Szeged skribis:

„Estas nenia laboro — aŭdiĝas de tagoj, de semajnoj. Nenia laboro troviĝas, precipe en urboj, kie nun paŭzas ĉia industria agado. Oni konsiladas, kaj en Szeged, kaj aliloke, kion fari kontraŭ la minacanta senlaboreco. Oni traktadas, mitingadas, sed la kapitalo ne moviĝas. La kapitalo atendas, taktikadas, ĉar ege ĝi alkutimiĝis al la militaj profitegoj, kiuj nuntempe ne troveblas. La kapitalo staras embuske, observas atendante la konjunkturon, la novajn milit-negocojn. Ĝis tiaj ne prezentiĝos, ĝi retiras sin, kaj ne volas krei laborebleĉojn.

Ni apenaŭ kredas, ke tia sinteno povas pludaŭri. Novaj ventoj blovas, kiuj kreskante al ventegoj, ŝtormoj, forbalaos la malnovajn manierojn . . .”

(Szegedi Napló, 1919. 01. 08.)

La opozicia flanko de la SDP pli kaj pli amase forlasis tiun partion, por liberigi sin de la oportunisma gvidantaro. La intertempe fondita *Hungarlanda Partio de Komunistoj* magnete altiris laboristojn, kamparanojn, intelektulojn, artistojn, kiuj volis sekvi la spertojn de la unua triumfinta laborista partio de Lenin. La KP konscie ekagis por vera proleta revolucio, vokis ĉiun kontraŭstari al la fortiĝanta kontraŭrevolucio, al la releviĝo de la eksa feŭdeca socia ordo. Mirinde rapide progresis la komunista partio, gvidita de Béla *Kun*, malnova socialista ĵurnalisto, kun granda scio ne nur pri la marksismo, sed jam ankaŭ de instruoj de Lenin. La influo de la KP kreskis en la lando de semajno al semajno, kion klarigas la jam historie pruviĝinta fakto, ke la ardajn problemojn de la lando, de la popolo, tiutempe plej prudente komprenis ĝuste tiu partio, kaj ĝi ankaŭ montris la plej racian elirvojon, la konvenan politikon por solvi la malfacilaĵojn.

Ervin *Fenyvesi*

Glosoj:

1 Sándor Petőfi—Kalocsay: Libero kaj amo. Strofo el »Miaj kantoj«, p. 117.

2 Vd. eseon pri Mihály Károlyi en HV nro 1975/3.

Géza Gyóni[1]

Nur por nokto sola

La poeto, kiel milit-kaptito en Krasnojarsk

Nur por nokto sola estu alsenditaj
al ni: malkonkordaj buŝherooj pitaj.[2]
Nur por nokto sola:
Ĉiu asertanto ke memor' nin ligas,
kiam mortmaŝino super ni muzikas;
kiam el nebulo kreskas korpo grajna:
kuglo-birdoj murdas en direkto ajna.

Nur por nokto sola estu alsenditaj:
skrupulaj serĉantoj de traberoj splitaj.
Nur por nokto sola:
kiam ekululas surdiga grenado,
tero muĝas kiel bovo ĉe buĉado;
eksplodanta kuglo se lumas per brulo,
kaj salte sin levas sango el *Vistulo.*

Nur por nokto sola estu alsenditaj:
uzuristoj fiaj, eĉ je groŝ', avidaj.
Nur por nokto sola:
kiam en la centro de vulkan' grenada
kiel arbfolio ŝvebas hom' turnata;
kaj post la refalo, ho, falo terura, —
la vigla bravulo — jam skeleto nura.

Nur por nokto sola estu alsenditaj:
dubemuloj, homoj ŝakre parazitaj.
Nur por nokto sola:
se ekfaŭkas arda eno de l' infero,
sangon ŝvitas arbo, sangon ŝvitas tero,
se el tend' ĉifona veas muĝa spiro
de soldat' mortanta: „edzin' ... mia filo ..."

Nur por nokto sola estu alsenditaj:
patrujamantoj de bojaj langoj glitaj.
Nur por nokto sola:
ĉe ŝprucanta lumo de blindiga stelo
spegulu ilian vangon *San*-rivero,
kiu jen hungaran sangon rulas flue,
ke ili plorkriu: Ho, Dio, ne plue!

Estu alsenditaj nur por nokto sola,
repensi pri panja akuŝo dolora.
Nur por nokto sola:
kiel ilin trafis tim-tremo horora,
ofta *mea culpa*[3] penitenco-vola;
Ĉiel do baraktus ili, pugn' al brusto,
kiel ili ĝemus: Kion eĉ pli, Kristo?

Kion eĉ pli, Kristo, kion mi pli donu
kontraŭ sangoprezo, ke mort' min pardonu?
Kiel ĵurus ĉiu,
forgesus orgojlon, eĉ se ateisto,
kiel vokus Dion, petegus al Kristo:
krius: „Neniam plu"! — la menson perdintaj ...
— Nur por nokto sola estu alsenditaj.

Przemysl, 1914.

El la hungara: *Márton Fejes*

Ilustraĵo de Károly Pató

1 Pron.: *djoni*
2 pita (Parnasa Gvidlibro): *eta,* kun la kroma senco *aĉa*
3 „mia kulpo" (latinaĵo)

Komenciĝas la biendistribuo al la kamparanoj. La unuan ŝtipon enfrapas prezidento Károlyi.

Mihály Károlyi

LA BIENREFORMO*

Koncerne la bienreformon montriĝis kontraŭaj opinioj enkadre de la koalicia registaro. Nur en februaro de 1919 ni atingis interkonsenton. La perdo de tiuj monatoj montriĝis fatala malfruo: ĝi fariĝis la kaŭzo de nia fiasko. Kontraŭ la ĉiam pli malamika sinteno de la feŭdaj klasoj, minacataj en sia ekzisto, estis eble teni la ekvilibron altirante la kampularon al nia flanko kaj akirante ĝian subtenon.

Tamen, la socialdemokratoj, kiuj ne havis adeptojn en agraraj rondoj, volis gajni tempon, por konstrui siajn organizaĵojn agrikulturajn, kaj pro tio ili sabotis la reformon. Teorie ili pravis, ja la bienhavanta kampularo estas konservativa, ne zorganta pri la sorto de la tuta lando, nur pri sia propra.

Gravan influon havis al la kamparanoj ankaŭ la romkatolika eklezio. Tamen, la prokrasto de la bienreformo praktike signifis tion, ke niaj kontraŭuloj gajnis tempon por turni la trompiĝintan kampularon kontraŭ ni.

Nia modera agrara reformo finfine estis akceptita de la registaro en februaro. La supra grandeco de la bienoj estis difinita je 500 arpentoj. Esceptokaze la ŝtato estis rajtigita ekspropriĝi ankaŭ bienojn superantajn 200 arpentojn. La bienojn ni volis distribui en formo de parceloj ampleksantaj de 5 ĝis 20 arpentojn (tiel granda teritorio donas sufiĉan viveblon por kamparana familio) inter senbienaj kamparanoj.

Parto de la grandbienoj ampleksantaj plurmil arpentojn, estus transformendaj je kooperativoj. La valoron de la bienoj ni fiksis laŭ la malaltaj antaŭmilitaj prezoj, kaj la posedintoj estus ricevontaj kompenspagon en formo de ŝtataj akcioj. La novaj bienuloj ricevis plurjaran prokraston por pagi al la ŝtato la prezon de siaj bienoj.

Tiu ĉi reformo similis tiujn de la najbaraj landoj. La iamaj hungaraj grandbienuloj, kiuj kun akra kolero kontraŭstaris tiun reformon, kaj dum jardekoj min malamis pro ĝi, nun jam bone konscias, — pluraj ankaŭ al mi rekonis tion — ke eĉ por ili estintus utile efektivigi ĝin siatempe.

Printempe ni komencis la biendistribuon. Kiel unu el la plej grandaj bienuloj, mi mem komencis ĝin sur mia propra bieno en Kápolna. Tio estis kvazaŭ la lasta guto por miaj parencoj kaj samklasanoj. Ĝis tiam ili iluziis sin, pensante, ke mi parolas pri bienreformo nur pro populareco, pro taktiko. Nun ili komprenis, ke ĉio perdiĝos, se ili ne ekagas.

La unua publika atako kontraŭ mi venis de mia frato, grafo József Károlyi. En Székesfehérvár li kunvokis la jam disigitan departementan kunsidon, kaj akceptigis deklaron pri malkonfido al mia registaro, postulante la restarigon de la malnova reĝimo. Partoprenis la kunsidon ankaŭ episkopo Prohászka, kiu antaŭ kelkaj semajnoj ankoraŭ estis nia apoganto. Sub lia gvido ankaŭ la katolikoj viciĝis kontraŭ ni. Tiu atako kuraĝigis eksoficirojn de la estinta aŭstrahungara armeo, kiuj nur atendis okazon por reakiri siajn perditajn poziciojn. Ili komencis organizi sekrete neleĝajn taĉmentojn: kompreneble, la malkaŝitajn ni disigis. El tiuj poste fariĝis la fifamaj blankteroraj taĉmentoj.

Pluvegis dum tiu februarfina tago, kiam ni komencis la distribuon de mia bieno. Kolektiĝintaj eĉ el malproksimaj vilaĝoj, la kamparanoj staris sub grandaj ombreloj, kaj desur ilia sulkoplena vizaĝo radiis al mi ia nepriskribebla miksaĵo de surprizo, admiro kaj suspekto. Ili estis jam tiomfoje trompitaj, sekve ne povis kredi, ke ilia revo nun realiĝos. Mia koro vere malpeziĝis, ĉar mi ĉiam havis konsciencriproĉon pro mia riĉeco: en mia junaĝo spontanee, poste jam konscie. En la teron de Kápolna — depost jarcentoj bieno de mia familio — mi enbatis palison, kie komenciĝis parcelo de la unua kamparano el la listo de la bien-pretendantaj agrarproletoj. Mi estis kontenta: la ordo de l' aferoj restariĝis, la tero apartenas de nun al la kampuloj.

Post la biendistribuo ĉe Kápolna ekestis legendoj, en kiuj mi figuris homo simila al Tolstoj aŭ Gandhi, kvankam tion mi ne meritis. Mi oferis ja nenion, ĉar mi neniam havis senton aŭ inklinon al posedaĵo. Tiu sento karakterizas plie la burĝaron, kiu per la propra forto akumulis sian havaĵon. Sed mi estis konata eĉ ene de mia klaso pri tio, ke mi neniel ligiĝas al mia posedaĵo. Do, mia tiel nomita grandanimeco ne estis virto. Ĉiam mi preferis doni, ol posedi.

El la hungara: Márton *Fejes*

* Fragmento el la aŭtobiografia libro de Károlyi: *Kredo sen iluzioj.*

Zseni Várnai

Ne pafu fil'...

Al vi nun skribas, bela fil' soldata,
Patrino via per la propra sang',
Ĉar dum vi servas tie la monarkon,
Nin trafis ruĝa mond' kiel lavang'.
Batalon ni preparas, la decidan,
Kaj estos vi l' armeo kontraŭ nin.
Se murdi viajn fratojn vi senditos,
Ne pafu fil', ĉar trafos ankaŭ min.

Al nova nupto ter-patrin' vekiĝis,
Atendas veni homojn kun plugil'
Prisemi ŝian sinon — kaj atendas
La vivodonan forton kun jubil'.
Sed nun ni montros potencegon nian,
Kaj en la vento spik' ne lulos sin.
Ja ni ribelos por la ter' produkta.
Ne pafu fil', ĉar trafos ankaŭ min.

Ho fil', en ĉi linioj tremaj ploras
Mi mem, portinta vin sub mia kor',
Por kiu vin prizorgi kaj vartadi
Egalis taga hor' kaj nokta hor'.
La sama karno, sang' el mia sango
Ĉu povos levi manon kontraŭ nin,
Se estos mi, veante kiu krios:
Ne pafu fil', ĉar trafos ankaŭ min.

Vi estas nia Kristo, la sendito,
Espero nia, nia sankta sav'!
Nun vi decidos nian grandan sorton
Laŭ via ekbolinta sang' de sklav'.
Obsedu vin pasi' revolucia
Kiam torentos la ribel' sen fin',
Muĝante kiel ventpelita tajdo . . .
Ne pafu fil', ĉar trafos ankaŭ min.

L' orgojlan ŝipon ŝiras kaj ĵetadas
Ankoraŭ nur la forta uragan',
Sed kiel estos, se el sia fundo
Eruptos mem la **granda ocean'!**
Kaj kiel estos, se soldatoj, ĉiuj,
Leteron havos de sia patrin'
Bruligan, fajran, sange ribeligan:
Ne pafu fil', ĉar trafos ankaŭ min.

Trad.: Tibor *Ujlaky—Nagy*

* Tiu ĉi poemo, kvankam verkita en 1912, vere populariĝis dum la unua mondmilito. La 31-an de oktobro 1918 oni presigis ĝin sur flugfolio kaj disdonis en grandegaj kvantoj sur la Budapeŝtaj stratoj. La poemon la tradukinto deklamis en la E-klubo Konkordo Bp., okaze de literatura vespero en la ĉeesto de la poetino.



Zseni Várnai



Mihály Babits en 1917

Mihály Babits

VIVU LA RESPUBLIKO!

Gefratoj!

La hungara popolo elbatalis por si la liberon. Ne la reĝo ĝin donis: la popolo mem elbatalis ĝin. La reĝo neniam donus tiun liberon. Jam neniu plu regas super la hungara popolo: nur la reĝo. Fratoj! En kies nomo oni portis vin al la terura hombuĉado? En kies nomo oni deklaris la kriman militon? Virinoj! En kies nomo oni sendis viajn edzojn kaj filojn en la monstran morton? En la nomo de la reĝo! Kaj ĉi tiu reĝo ankoraŭ regas.

La germanoj forprenis el la manoj de la imperiestro la rajton deklari militon kaj kontrakti pacon, kaj tion ili trovas ankoraŭ nesufiĉa. Ili tute ne volas havi imperiestron. Kaj en nia lando? La reĝo ankoraŭ sengêne disponas ĉiujn siajn rajtojn. Tiam li sendas nin murdi kaj morti, kiam tio plaĉas al li.

Fratoj! Vieno kaj Aŭstrio volas respublikon. Habsburgoj tie ne plu havas ian ajn bazon. La ŝtatoj, kiuj formiĝis post la diseriĝo de la Monarkio, unu post la alia alprenas la respublikan formon. La imperio elglitis el sub la piedoj de Habsburgoj. Restis por ili sola fiksa punkto. Kiel lasta azilo, lando stulta: Hungario! Ili venas al ni kun sia tuta parenchordo, siaj arkidukoj, korteganoj: kaj ni salutas per lojala brakumo tiujn, kiujn el aliaj lokoj forbalais la justa popolkolero. Ĉu ili faris al ni tiom da bono? Ne, hungaroj!

Hungario ŝuldas al Habsburgoj nur malbenojn, malamon.

Kiam ili memvole plenumis niajn dezirojn?

Kiam ili kondutis al ni alie, ol subpreme, malamike, buĉiste?

La hungaran historion trateksas la memoro de iliaj teruraj agoj. Ili ekzekutis la plej bonajn inter ni, kiel krimulojn. La sango de Zrinyi, Frangepán, Martinovics kaj liaj kamaradoj, la sango de la martiroj de Arad vokas kontraŭ ili al la ĉielo!

Gefratoj!

Ne lasu trompi vin!

For la denaskajn kaj pagatajn popolbuĉistojn!

Vivu la respubliko!

El la hungara: *V. Benczik*

Béla Kun (1886—1939)

NASKIĜAS NOVA PARTIO

„La revolucio venkis" — grandlitere kriis la ĵurnaloj, kaj la ĝenerala eŭforio eĉ kredigis al la homoj, ke tio estas la vero.

Sed tio estis maksimume vero duona: la „revolucio kun asteroj" fakte forblovis la feŭdismon, kaj faris kelkajn paŝojn sur la vojo, konduka nta al la plena socia justeco. Tamen, tiuj kelkaj paŝoj ne povis kontentigi la popolamasojn, kiujn hardis la suferoj de kvarjara kruela milito.

Bone konsciis tion la homoj, kiuj la 24-an de novembro 1918 kunvenis en Budapeŝta privata loĝejo (strato Városmajor 42.) Inter ili estis maldekstraj socialdemokratoj, kiuj trovis nepre necese fari pluajn paŝojn sur la vojo de la revolucio, militkaptitoj, revenintaj el Ruslando, do havantaj proprajn spertojn pri la proleta revolucio, kaj ankaŭ aliaj homoj, kiuj rekonis, ke plena socia justeco estas realigebla nur en socialismo. La celo por ili estis klara: elbatali la venkon de la proletaro ankaŭ en Hungario. Kaj ankaŭ la unua farendaĵo estis evidenta: fondo de revolucia partio, kiu kuraĝe, sen kompromisoj reprezentos la interesojn de la laborista klaso, kaj de ĉiuj honestaj laboruloj. Ili tuj ekagis, kaj en tiu sama loĝejo estis fondita la *Hungarlanda Partio de Komunistoj*. Estis elektita ankaŭ 17-membra Centra Komitato, kies gvidanto fariĝis Béla *Kun*, militkaptito ĵus reveninta el Ruslando.

Pasis nur kelkaj tagoj, kiam jam eliris la unua numero de *Vörös Újság* (Ruĝa Gazeto), organo de la nova partio. Certe ĝi ne trovis plaĉon ĉe la registaro, eĉ ne ĉe la socialdemokrataj gvidantoj. „Klasbatalon!" — alvokis ĝia gvidartikolo, kaj ĝi konigis la konkretan programon de la komunistoj: „. . . .*Alvenis la tempo . . . realigi la socialismon. La proletaro nun sentas en si kaj forton, kaj volon batali por la realigo de tiu ĉi celo . . . Sed kiu gvidu la proletaron en tiun ĉi batalon? La malnovaj socialdemokrataj partioj ĉie en la mondo alianciĝis kun la burĝaro . . . laŭ la socialdemokrata partio la revolucio jam venkis . . . Tio estas ne sole mokgrimaco al la marksismo, erarigo de la laboristaro kaj kamparana malriĉularo: tio estas klasbatalo . . . Pro tio ni, hungaraj komunistoj, elpaŝas nun antaŭ la hungara laboristaro, por prepari ĝin al la necese okazonta . . . proleta revolucio . . .*"

La nova partio fariĝis rapide populara en la lando. Kun iom da ironio oni povus diri, ke ĝi havis certasence „facilan" situacion, ja neniu alia partio donis rektan kaj klaran respondon al la lanĉiĝantaj demandoj kaj problemoj.

La burĝaj partioj volis nepre restarigi la „ordon", por senĝene ĝui la akiritan potencon. Plimalpli same agis ankaŭ la socialdemokratoj: per vortoj ili vivuis la revolucion, sed ĝiaj gvidantoj faris ĉion eblan, por silentigi la popolon. Ne estas do mirinde, ke la „popola" registaro ne longe toleris la liberan agitadon por la plua disvolvo de la revolucio.

La 3-an de februaro 1919 la redaktejon de *Vörös Újság* vizitis neatenditaj gastoj: polica taĉmento. La policistoj — oficistoj de la „popola" registaro, — renversis la redaktejon, konfiskis ĉiujn manuskriptojn, presprovaĵojn, librojn (inkluzive *Faŭston* de Goethe), kaj malebligis la pluan aperadon de la gazeto por kelka tempo. La sekvan baton la partio ricevis la dudekan de februaro: la registaro, arestigis sepdek komunistajn gvidantojn, inter ili ankaŭ Béla Kun.

Tamen, la arestoj ne paralizis la agadon de la partio, ja malgraŭ la aserto de la „popola" registaro, la komunistoj tute ne estis „manpleno da demagogoj". La laboristaro daŭrigis la batalon. Apenaŭ pasis monato, kaj la socialdemokrataj partiaj ĉefoj vole-nevole mem iris en la malliberejon por intertrakti kun la komunistaj gvidantoj. Kaj la 21-an de marto ĉiuj arestitaj komunistoj eliris el la malliberejo ne kiel amnestiitaj malliberuloj, sed kiel popolkomisaroj, (ministroj) kaj aliaj altrangaj ŝtataj funkciuloj.

V. *Benczik*

ESPERANTO-MOVADO DUM LA BURĜA

Dum la unua mondmilito en tuta Eŭropo disfalis la E-movado, la societoj kaj grupoj, ĉar iliajn membrojn oni devigis al la frontoj por morti kaj mortigi pro fremdaj interesoj. Multaj mortis, aŭ fariĝis militkaptitoj. Ankaŭ en Hungario malkreskis la movado post la eksplodo de la mondmilito. Disfalis la intelektula-oficista Hungara Tutlanda Esperanto-Societo (HES) kaj la Hungarlanda Esperanto-Societo Laborista (HESL).

En 1915 la Budapeŝtaj esperantistoj — tiuj, kiuj evitis la soldatiĝon — provis reorganizi la movadon, sed la fortostreĉo rezultis nur kelkajn lingvokursojn. Dum 1916 kaj 1917 efektive ne estis E-movado en Hungario. Komence de 1918 la HES-anoj en Budapeŝto denove ekorganizis, sed la entuziasmo ne povis anstataŭi la forestantojn kaj venki la malfacilaĵojn kaŭzitajn de la militaj dekretoj, malpermesintaj ĉiun ajn kunvenon kaj organizadon.

La Filatelista Societo en Budapeŝto funkciis, ĝiajn kunvenojn oni ne malpermesis, ĉar ĝia ĉefprotektanto estis reĝido. HES tie organizis filatelistan grupeton. Parlamenta deputito, Sándor *Giesswein,* estis tiam prezidanto de HES, gvida pacifisto samtempe. Vizitante provincajn pacifistajn grupojn, Giesswein propagandis ankaŭ por Eo; kelkloke komenciĝis lingvokursoj, ankaŭ en Budapeŝtaj mezlernejoj. Tamen ĉio ĉi ne havis kontentigajn rezultojn pro la menciitaj malfacilaĵoj, kaj la afero de la movado restis tiel izolita ĝis aŭtuno de 1918. Nur en Szeged aperis modesta informilo de HES, poste la sola „organizilo kaj propagandilo", kun titolo „Hungara Esperantisto".

La militaj malvenkoj kaj la disfalo de Aŭstrio—Hungario, kaj precipe la venko de la Hungarlanda burĝa-demokrata revolucio en oktobro 1918 kreis novan, favoran situacion. La revolucio ĉesigis la militajn dekretojn kaj ebligis liberan organizadon. Hejmenvenis multaj soldatoj, multaj militkaptitoj el Sovet—Ruslando. Je honoro de la hejmenvenintaj esperantistoj HES aranĝis festenon en Budapeŝto kun granda partoprenantaro.

La centro de HES funkciis tiam en la Muzeo pri Sociaj Sciencoj en Budapeŝto, kie ĉiusemajne sekvis unu la alian la kunvenoj. La tie kolektiĝantaj laboristaj esperantistoj baldaŭ reorganizis sian societon. En la socialdemokrata ĵurnalo NÉPSZAVA jam en novembro lanĉis alvokon Sándor Károlyi, eksa kasisto de la laborista asocio, al iamaj anoj de HESL por ĝin reorganizi. Konataj aktivuloj fervore laboris tiucele, kaj meze de decembro en ejo de HES jam okazis re-fondiĝanta ĝeneralkunveno de HESL. Oni elektis sekretario presiston László *Izsó,* estraranoj i. a. lignaĵlaboriston *József Nagy* (kiu eĉ hodiaŭ bone memoras tiun eventon), S. *Károlyi* kaj Paŭlon *Balkányi.*

Antaŭmilita tradicio estis tiel daŭrigita: en la estraron de HESL oni elektis ankaŭ gvidanton de la „neŭtrala" movado, kaj inverse: L. Izsó estis samtempe redaktoro de „Hungara Esperantisto", revuo de HES. Tiu situacio montris la striktan kunlaboron, tamen ankaŭ la malforton de ambaŭ societoj: la movado povis ekzisti nur per reciproka helpo de ambaŭ societoj. E-instruistoj de HES volonte disvastigis la lingvon ĉe la sindikataj laboristoj.

La progreson de la movado forte helpis la revolucia politika situacio, kaj la bonaj interrilatoj kun la politikaj partioj de la koalicia registaro, kiuj siaflanke volonte flegis la kontaktojn kun la vivforta E-movado. Mem Giesswein, prezidanto de la intelektula societo HES, estis membro de la Nacia Konsilio, havis bonegajn rilatojn kun la progresemaj intelektuloj en la burĝa Radikala Partio, kun la Rondo Galilei (ties nomo mem klarigas sin), krome kun la kontraŭmilita rondo de Ervin *Szabó,* tre populara kaj rekonita scienculo. El ambaŭ rondoj poste la anaro aliĝis al la Hungarlanda Partio de Komunistoj.

HESL apartenis al la Socialdemokrata Partio, kiu estis la plej forta faktoro de la koalicia registaro. Ankaŭ komunistoj agadis en la societo, inter ili ni menciu d-ron Rudolf *Rajczy,* poste ano de la dua (sekreta) Centra Komitato de la komunista partio; Pál *Robicsek,* ankaŭ grava funkciulo de la partio: en februaro 1919 li estis enprizonigita kune kun la plej „danĝeraj" komunistoj, kun Béla *Kun.* Tiuj interrilatoj certigis bonintencan helpon flanke de la ŝtataj aŭtoritatoj, kaj dum la periodo de la burĝa revolucio, gvidita de Mihály *Károlyi,* kaj post la socialisma revolucio.

Aparte interesa estas el movadhistoria vidpunkto, tiam ja havis gravegon rolon memstara organizaĵo, fondita en novembro 1918: „Propaganda Komitato de IL". Sendependa de ambaŭ societoj, ĝin organizis elstaraj intelektuloj de HES, verŝajne laŭ instigo de Giesswein. La ideo estis krei organizaĵon konsistantan el eminentuloj de la literatura kaj politika vivo, por subteni la propagandon de Eo, kaj informi la eksterlandon pri

* * * * * * * * * * * * *

REVOLUCIO

la celoj kaj agadoj de la revolucia ŝtato, pere de Esperanto. La Komitato baldaŭ fariĝis ankaŭ harmoniiga organo en la E-movado, kaj kunligilo inter la movado kaj la ŝtataj instancoj.

Konata verkisto, Lajos *Bíró*, estrarano de la Radikala Partio kaj de la Nacia Konsilio, ŝtatsekretario, iĝis la prezidanto de la Komitato. Inter la vicprezidantoj partoprenis Frigyes *Karinthy*, la konata verkisto, satiristo, Dezső *Kosztolányi*, poeto, Aladár *Schöpflin*, redaktoro, literaturisto, lingvistoj Sándor *Balassa* kaj Zsigmond *Simonyi*. Kvankam ili ne scipovis E-on, estis tamen adeptoj de la Zamenhofa ideo (eĉ apogis la esperantistojn kontraŭ la Budapeŝta Ido-movado). Ĝen. sekretario Paŭlo Balkányi, sekretario L. Izsó, kasisto Elek Tolnai. Ambaŭ societoj kompreneble apogis la Komitaton; la plej talentaj tradukistoj de HES aliĝis komence de 1919, inter ili la juna *Kalocsay*. La laborista societo eĉ finance povis jam helpi la Komitaton, ĝi organizis vastan monkolektadon inter laboristoj.

Fr. Karinthy baldaŭ publikis grandiozan artikolon en la ĵurnalo „Pesti Napló" sub titolo „Esperanto"; ĝi respegulis la humanismon de la aŭtoro, kaj havas propagandan valoron eĉ nuntempe. El la kolektita mono la Komitato eldonis flugfoliojn kaj afiŝojn por propagandi E-on. Delegitaro iris al Oszkár *Jászi*, la komisiita rektoro de la Scienca Universitato, kiu poste permesis instruadon de Eo al la studentoj.

„Unua Esperanto-Tago" estis aranĝita fare de la Komitato meze de marto. La propagandcela evento kunigis la esperantistojn el la tuta lando, simile al landaj kongresoj. En ties kadro okazis solena ĝeneralkunveno de HESL. El la festparolado de Izsó la ĵurnalo „Népszava" citis la sekvantan frazon: „Kune kun la triumfa ruĝa standardo marŝadas antaŭen la trikolora standardo, ornamita per verda stelo de internaciaj esperantistoj, al la eterna mondpaco". Sentoj kaj pensoj de la socialistaj laboristoj esperantistaj esprimiĝis tiel en la vortoj de la senlaca sekretario. La solenaŋ kunvenon de HES sekvis granda demonstracio tra la stratoj de Budapeŝto; oni disdonis flugfoliojn, per tabuloj propagandis la Internacian Lingvon.

Post kvin tagoj, la 21-an de marto 1919 venkis la socialisma revolucio, la potencon prenis en siajn manojn la laborista klaso. La paca venko de tiu revolucio kompreneble bone efikis al la plua evoluo de la E-movado: la esperantistaj organizaĵoj, HES, HESL kaj la Komitato povis libere daŭrigi sian funkciadon. Kun granda helpo de la proleta ŝtato, la E-movado paŝis forte antaŭen dum la Konsilio-respubliko. Sed tio estas jam alia, glora ĉapitro en la historio de la hungara Esperanto-movado.

Zoltán *Barna*—Ervin *Fenyvesi*

LAJOS TÁRKONY (1902—1978)

La hungaraj esperantistoj jam estis ekvojagontaj al Varno, kiam trafis nin la korprema informo: la 1-an de julio mortis Lajos TÁRKONY, eltara poeto, tradukisto kaj kritikisto, cefkunlaboranto de nia revuo.

Li estis la lasta hungaro el la grandulo j de Literatura Mondo, en kiu revuo li komencis sian literaturan karieron kiel Ludoviko TOTSCHE. Foliumante la jarkolektojn de Literatura Mondo kaj Hungara Vivo, apenau oni trovas numeron sen lia nomo. Nia revuo dedicis al lia verkaro la n-ron 1975/6.

Li kreis temprezistajn verkojn en ciuj literaturaj brancoj, kiujn li



kulturis. Cefverkojn, kiujn ne velkigos la fakto, ke korpe li ne plu estas inter ni.

Julius Balbin

Al la Budapesta skolo

Okaze de l'Kongreso
jen al Budapesto
el usona foro
per poŝta ekspreso
la saluta gesto
de sam-sona koro.

Vi en via horo
kantas tre madjare —
akorde kaj are,
dum ni en Usono
kantetas nur ŝpare,
kun pen' kaj sen gloro,
en... misunisono.

Por la diapazono
de la fama skolo
harpon de Eolo
kun elkora dezir':
Vivu ĝia rolo
per liuto kaj lir'
por mondliteratur':

Ho, se ni povus nur,
sur la kontinento
de la senidento
de sinteza kultur',
sen brustbatoj de pento
elsorĉi kun sento
flaŭron poezian —
genion baghyan,
Kalocsayon sian,
aŭ almenaŭ ekkoni
la propran Tárkony!

1966

*Ferenc Molnár**

LA EGULO

La tridekan de Aprilo ni vespermanĝis en urboboska vilao. Post noktomezo ni akompanis la sinjorinojn en la urbon kaj post la adiaŭo, kiam ni tri junuloj restis solaj antaŭ la pordego, unu el ni proponis reiri en la urboboskon, kie la popolo atendas la Unuan de Majo. Ni enfiakriĝis kaj dum kelkaj minutoj ni estis jam tie. La Amuza Parko faris al mi tian impreson, kvazaŭ estus dimanĉa posttagmezo, sed ĉe suneklipso. La diablo- kaj boatobalanciloj turniĝis akompane de la ŝrikantaj voĉoj de la gurdo. Fantastaj boatoj pendis per balancilŝnuregoj; ili flugis alten kontraŭ la ĉielo, la granda rado turniĝis kun freneza rapideco kaj sube inter la ĉiuspecaj, diverskoloraj lampoj, en la kolora lumo, ĉirkaŭ brilegaj karuseloj kvardek mil homoj atendis la Unuan de Majo. Ĉi tiu dimanĉa posttagmezo estis konsterna vidaĵo. En la restoracio eĉ unu sidloko ne estis libera. Oni kantis ĉe la tabloj, kvar-kvin orkestroj el la vilaĝo Budakeszi muzikis. La elkriistoj de la spektaklejoj kornadis, sonorigis, anonckriadis, per bastoneto ili frapadis la batalscenojn pentritajn sur tolo kaj de tempo al tempo en ĉi tiu granda voĉbruo kun infera krakego kuregis malsupren la vagonetoj de la ondfervojo, plena de ŝrikantaj servistinoj.

Kaj la aero estis plena de la parfumo de la siringfloroj. Knabinetoj vendis multajn bukedojn el la freŝaj, antaŭ nelonge deŝiritaj floroj kaj la malvarmeta printempa nokto estis peza pro la parfumo.

Longe ni vagadis en la interpremiĝanta hominundo kaj ĉirkaŭ la dua kaj duono ni komencis interparoladi kun la elkriisto de la panoptiko.

— Ne preterlasu la okazon, sinjoroj — li diris, ĉar tiaĵon vi ne vidis ankoraŭ.

Post tio li denove komencis elkriadi al la malrapide paŝanta tumulto:

— Ĉi tie videblas Zajem Abdallah, la tri metrojn alta negra egulo! Li prezentos la armildancojn de sia patrujo, la Afrikan militan kriegon kaj per sia dumetra glavego li plurfoje frapos kontraŭ sia malamiko! Unuaj sidlokoj kostas dudek, duaj sidlokoj dek, triaj sidlokoj nur kvin krejcerojn!...

Li denove turnis sin al ni:

— Bonvolu sinjoroj, vi ne pentos.

Ni eniris la panoptikon, en kies lasta ĉambrego troviĝis la scenejo kun la grupo de la negroj. Jam tiam la fumo estis densa kaj oni dormetis sur la lignobenkoj. Meze sub dubranĉa gaslampo estis la podio, sur kies rando sidadis la negroj. La spektaklo komenciĝis nur post duonhoro, tamen jam ne malmulte da spektantoj atendadis. En la lasta vico kvar friponoj dormis unu apud la alia, apogiĝintaj al la muro. Ĉe la fino de la longa lignobenko maljuna sinjoro fumis sian cigaron Virginia. Sur alia lignobenko sidis infanteriano kun malantaŭen ŝovita kepo, apud li estis lia amatino — grasa, ruĝvizaĝa knabino, kiu dormis klinante sian kapon sur la ŝultron de la soldato. Ankaŭ li dormetis, sed foje-foje li timvekiĝis kaj tiam li karesis la glate kombitan hararon de la knabino per sia granda, ruĝa mano. Ni atendadis kaj la novaj spektantoj sencese venis. La lignobenkoj estis jam preskaŭ plenaj, la fumo iĝis neelportebla, la gaslampoj kvazaŭ malaperis en ĝi. Sinjoro, surkape kun cilindra ĉapelo marŝadis tien kaj reen sur la podio kaj interparoladis kun la negroj. Poste je la unua sonorigo, en la angulo ekmoviĝis malpura kovrilo kaj el sub ĝi elrampis Zajem Abdallah, la negra egulo. Ankaŭ la friponoj vekiĝis kaj tuj ekridis. Abdallah membrostrecis.

Fakte li estis tre alta, sed ekstreme malgrasa. Oni povis nombri liajn ripojn kaj kvazaŭ liaj kruroj estus el nigraj ostoj. Liaj brakoj estis la plej maldikaj. Sed liaj okuloj flame ardis, ili blanke lumis en lia nigra vizaĝo.

— Abdallah! Abdallah — kriis tiuj, kiuj jam konis lin. De iom da tempo li estis populara en la Amuza Parko.

Ankaŭ li diris:

— Abdallah — kaj li provis rideti.

En la ĉambrego la varmo estis jam sufoka, kaj estis tre malagrable, ke la ejo ne estis sufiĉe hela. Ĉie malpuraĵo. La infanteriano ronkis, tial oni puŝis lin. Tiam ankaŭ lia amatino vekiĝis, frotante siajn okulojn.

— Aj, kiel aĉa — diris la soldato, kiu post la vekiĝo kvazaŭ ekvidus ian teruraĵon.

Abdallah venis antaŭ la podion kaj salutis nin. Iome li tordis la germanajn vortojn.

— De kie vi venis? — ni demandis.

Per sia seka mano li montris tre foren kaj diris:

— Afriko, Afriko.

Li ŝajnis malgaja kaj nevole mi demandis:

— Kial vi ne reiras?

— Mono, ne estas — li respondis.

Poste li rakontis, ke tial li fuĝis el Afriko, ĉar li volis akiri monon. Tiu germano, kiu lin forlogis en Berlinon, prirabis lin. Li forprenis lian salajron por manĝaĵo, vesto, — eĉ por tio — por ĉio. Mallerte, kaŝe li rakontis, ke li eskapis kun knabino. Li estus volinta labori en zoologia ĝardeno, sed nenie oni dungis lin. Tiel li parolis pri la zoologia ĝardeno, kiel pri ia granda akademio, kie labori, vivi estas bone kaj glore. Hazarde ĉi tie troviĝis malgranda, mizera trupo, li aliĝis al tiu.

Li faris malvolontan mangeston parolante pri la trupo. Tiuj povas esti nur duagradaj negroj. Poste li komencis tusadi kaj almontrante sian bruston, raŭkvoĉe li diris:

— Krank**... Krank...

Ni vidis bruli de febro lian nigran vizaĝon. Sensalute, senvorte li iris plu kovrante siajn ŝultrojn per foruzita tapiŝpeceto — kiel la primadono kovras sin per robo — kaj strangmaniere levante siajn piedojn, li marŝadis en la spektaklejo.

— Abdallah, Abdallah — kriegis la friponoj. Ankaŭ de maldekstre oni vokis lin. Abdallah estis populara.

Denove eksonis la sonorilo kaj la sinjoro surkape kun cilindra ĉapelo surtretis la podion.

— Mia nomo estas direktoro Vilhelmo Veis — kaj en mallonga, ellernita parolado li rakontis, kiuj estas la negroj kaj kion ili faros.

Post tio li surkapigis la cilindran ĉapelon kaj fajfis. Unue la tamburo eksonis, poste malgaje la akratona fajfilo, kiu eligis ĉiam la samajn tri-kvar tonojn. En ĉi tiu melodio estis ia tre fremda sopiro, malgaja monotoneco, kiam la du tamburoj agordigitaj je diversaj tonoj, eligis tamtamojn kaj la fajfilo uzita en la foraj dezertoj, komencis plorboji. Ni

*La aŭtoro naskiĝis antaŭ cent jaroj, en 1878.

**Malsama (germane).

ne rimarkis, sed la negroj jam dancis laŭ ĉi tiu muziko. La publiko ege ridaĉis pri la skuiĝa, preskaŭ senmova, apenaŭ turniĝanta danco. La negroj dancis, pri nenio zorgante.

Post la danco sekvis la programo de Abdallah. Nun la kompatindulo penadis ŝajni timiga. Li envenis kun granda ŝildo kaj glavego, li portis surŝultre grandegan arkon. Li klakigis siajn dentojn, elstarigis siajn okulojn kaj li komencis la armildancon.

— La milita armildanco — anoncis sinjoro Vilhelmo Veis.

Abdallah forte surfrapis sian ŝildon per la glavego kaj guturale li kriadis, vortgalopante en sia lingvo, kiu estis plena de vokoj „a" kaj „r". Li piedfrapis laŭ la stranga ritmo kaj svingbatis per la glavego, levante la ŝildon super sian kapon, li dancis kun ĉiam pli granda impeto. El la podio eliĝis polvo, kie ĉi tiu granda osto saltadis batalante kontraŭ la imagita malamiko. Li ĉiam pli forte kriegis, turnadis pli rapide la glavegon frapante per ĝi de tempo al tempo la ŝildon. Fone la negroj staris laŭvice, batis la tamburojn, kantis, fajfis kaj ĉio ĉi laŭ tiu lama ritmo, laŭ kiu Abdallah dancis.

Ni vidis, ke li premas sian bruston kaj li daŭre tusis.

— Li ne eltenas ĉi tiun klimaton — diris sinjoro Vilhelmo Veis.

La malfeliĉulo ne eltenis la klimaton, tamen li dancis, saltadis, frapis la ŝildon kaj kriegis, kiam la tuso ne malhelpis lin. La publiko bonege amuziĝis, ridis, aplaŭdis kaj senĉese kriegis lian nomon:

—Abadallah! Abdallah!

Nun la kompatinda Abdallah vere tre misfartis kaj jam tiel ŝajnis, ke eĉ la dancon li ne finos. Li nur ĵetadis sian grandan korpon, lia kapo foje-foje falis sur lian bruston kaj lia brako nur pene tenis la glavegon. La piedfrapado limiĝis pli kaj pli sur malgrandan lokon kaj fine li levadis siajn piedojn sur la sama loko. Poste sen ŝanceliĝado, abrupte li sterniĝis sur la podio kun granda falego.

Granda rido eksplodis en la ĉambrego. Malantaŭe oni aplaŭdis kaj la kvar friponoj tuj ekfajfis.

Abdallah ne leviĝis. La ridaĉo iom post iom formortis kaj interrompiĝis ankaŭ la kantado de la negroj. Nun la tamburo sonis sole ankoraŭ je plenda, obtuza voĉo.

Sinjoro Veis suriris la podion kaj provis levi Abdallah. La granda korpo ne moviĝis, li plurfoje provis levi nur sian kapon, sed ĝi refalis. Tiam nigra knabino estis jam apud li. Ŝi povis esti tiu, kiu eskapis kun li. Oni ne povis lin suprenlevi. La tamburo ankoraŭ sonis tamtame en la fono, malantaŭ la kantistoj, poste subite ankaŭ ĝi silentiĝis. La aliaj silentigis ĝin. La spektantoj staris sur la lignobenkoj por vidi, kio okazos al la negro. Abdallah komencis tusi tiel terure, ke estis dolore aŭdi. Nur sovaĝulo povas tusi tiamaniere: el profundo, stertorante, per ŝrikanta, preskaŭ bojanta voĉo, tre suferege. La tusatako ĵetis supren kaj skuis lian grandan korpon. Sinjoro Veis estis ekscitita. Li ŝvitis pro la fortostreĉo provante plurfoje levi lin. Poste li ekpensis ion, li demetis sian cilindran ĉapelon kaj diris:

— Estimata publiko, pro la abrupte okazinta malbonfarto... la daŭrigo de la spektaklo... indulgo estas petata...

Ĉar li ne sukcesis levi Abdallah, li almontris la senĉese tusantan Abdallah kaj diris:

— Li ne povos plu ludi, kaptis lin la tusatako!

La publiko volis vidi kiel li aspektas, kiam lin kaptas la tusatako, sed la membroj de la panoptiko iom post iom elpelis ilin. Kelkaj — la elita publiko kaj la infanteriano, kiu ne lasis sin elpeli — restis en la ejo.

La tusado de Abdallah aŭdiĝis nun eĉ pli terure en la malplena ĉambrego. La negroj kuris al li, ili kune levis kaj elportis lin sur la kovrilojn. La knabino veadis, per kriega voĉo ploris apud li. Frostotremo trakuris mian dorson, tiel terure fremda estis al mi ĉi tiu sceno. Forte mi sentis la timinde grandan diferencon inter Abdallah kaj mi. Ĉi tiu ploro estis tiel fora, tiel nekonata, ĉi tiu tuso similis al ŝakalbojado, sur la rigidiĝe gapantaj vizaĝoj miaj Eŭropaj okuloj ne kapablis ekvidi ian signon de la kompato.

Ili forvišis la sangon de sur la buŝo de Abdullah per blua poŝtuko. La tuso malfortiĝis. Sed la nigra amatino de la malfeliĉulo nun eĉ pli laŭte ŝrikis, stampfadis kaj frapadis siajn femurojn. Sinjoro Veis kuradis, li zigzagis tien kaj reen inter la grupo de negroj kaj la akvokonduko, li portis akvigitan tukon kaj kriis:

— Stejner, kuru por kuracisto!

Tiam mi ektimis kaj rapide ekiris eksteren. Mi ne povis rigardi kiel mortos en la panoptiko Afrika negro. Mi estis plena de malgajeco. Mi estus kapabla vangofrapi sinjoron Veis, kiu — se diri sincere la veron — volis nur gajni sian vivpanon.

Ĉe la pordo mi aŭdis ankoraŭ la plorantan kriegon de la negra knabino.

— Abdallah!

Sed ne tiel, kiel ni elparolas ĝin, sed tute alimaniere.

Mi atingis la vojon kie nun eĉ pli multaj homoj voĉbruis. Oriente la ĉielo estis jam ruĝa, tagiĝis. Ekstere estis malvarmete kaj ĉio estis plenplena de siringfloroj. Mi volis enŝoviĝi en la tumulton, sed oni rompis vojon en la homamaso, ĉar venis la socialistoj. Ĉefronte fortaj junuloj portis la ruĝan standardon, post ili en densaj vicoj okope, freŝe venis la aliaj. Ili kantis kaj ilia kanto kiel tempesto sonis malproksimen super plurmil homoj. Alveninte al ni, jam ne nur ili, sed ĉiu kantis. Akre sonis, triumfe sonoris la marŝo. Ili levis alten siajn sloganajn tabulojn, sur kiuj estis skribite:

„Rajton por la popolo!" „Ĝenerala voĉdonrajton!" Ili kantis la Marseillaise-on la Unuan de Majo ĉe sunleviĝo kaj eble sole mi sciis, ke en la panoptiko sur malpuraj tapišoj estas mortanta mizera, orfa filo de la varmega Afriko, kiu ne povis labori, al kiu estis maleble sin dungigi en zoologia ĝardeno.

El la hungara: d-ro István *Nagy*

ATUTA ROMANO REE HAVEBLA!

Tiu ci verko foje jam ravis legantojn en ciuj kontinentoj. Nun, reeldonita, gi certe denove farigos satata legajo por ciuj, kiuj ankorau ne forgesis pri sia infanago. — 180 p. Prezo: 13,80 ned. gld. Mendu ce UEA au rekte ce Hungara Esperanto-Asocio.

★ ĈAPITROJ EL LA HISTORIO DE LA

5. STABILIĜO



Reĝo Karlo Roberto sur inicialo de la Ilustrita Kroniko

Jardekon daŭris la akra batalo de reĝo *Karlo Roberto* (1308—1342) kontraŭ la oligarkoj. Tiuj rabis bienojn kaj servutulojn de multaj nobeloj, riskigis la komercan trafikon,

Gotika kapelo en klostro de Franciskanoj (urbo Sopron)



stampis proprajn monerojn; inter ili la plej potenca, Máté *Csák* eĉ havis preskaŭ reĝan kortegon. La diversgradaj nobeloj, minacitaj de la feŭda anarkio, aliĝis al la reĝa armeo, kiun forte subtenis ankaŭ urboj. Ties bone ekipitaj trupoj grave kontribuis al la decida venko de la reĝo ĉe Rozgony[1], 1312. Baldaŭ estis tute subpremita ĉiu kontraŭstaro de la granduloj, kaj la reĝa potenco etendiĝis tra la tuta lando. Novaj grandbienuloj kaj ĉefpastroj formis la regantan tavolon, la konsilion de Karlo, kiu cetere neglektis kunvoki la landan asembleon de la nobeloj. Ekde 1323 la fortikaĵo de *Višegrad* (norde de Budapeŝto) estis la rezidejo de la reĝo.

La armeo de la lando aliformiĝis. Al la reĝaj trupoj alviciĝis la feŭdaj trupoj de la grandbienuloj. Ties vasaloj, ĉefe etnobeloj, parte kirasitaj, deĵoris en tiuj trupoj, sub blazonoj, standardoj de sia feŭdmastro. La plimulto portis anstataŭ kiraso fortikan led-mantelon sidante sur rapidkuraj ĉevaloj. Kvankam tiel denove kreskis la armila forto de la baronoj, nun mankis jam ebleco por ili apartigi provincojn, eĉ se ili daŭre strebis ampleksigi siajn bienojn. Pro tio Karlo persiste klopodis firme fundamenti la reĝajn — tio signifis la ŝtatajn — *financojn*, kaj lerte utiligis la spertojn de la ekonomie altevoluintaj Italiaj ŝtatoj.

Reĝa monopolo iĝis la fabrikado de noblaj metaloj; ties ercoj tiutempe abunde troviĝis en la lando kaj la reĝo sagace stimulis la bienulojn ekspluati siajn subterajn trezorojn, ke tiuj alfluu al la reĝaj or- kaj arĝentfandejoj. La amasiĝanta oro ebligis stampi — laŭ Florenca modelo — novspecan ormoneron *„florint"*, alte taksita en la Eŭropa komerco pro ĝia daŭre stabila valoro. Ĝi estis jam vere necesa por la enlanda merkato, kiu dume forte kreskis pro la plimultiĝantaj metiistoj kaj komercistoj. En iliaj aŭtonomaj urboj riĉaj patricioj estris la magistratojn, gildoj formiĝis, ariĝis aliflanke senhavuloj, liberaj fru-proletoj.

La kreskado de la varoprodukto intensigis ankaŭ la eksterlandan komercadon, precipe la eksportadon de vino, brutoj, kupro, arĝento, oro. Florencaj, Veneciaj, dalmataj kaj germanaj komercistoj svarmis por enporti en la landon spicvarojn, silkojn, drapojn, armilojn kaj aliajn metiaĵojn. La komercadon al okcidento ĝenis forte en Vieno la deviga foiro por la trapasantaj komercistoj, resp. varoj. Karlo atingis gravan diplomatian sukceson, kiam li interkonsentis kun la ĉeĥa kaj pola reĝoj je komuna politiko kontraŭ la rajtoj de Vieno. Ilia kongreso en Višegrad (1335), difinis aliajn komercajn vojojn (tra Brno, Krakovo, Lvov,

1 Nun *Rozhanovce* en Ĉeĥoslovakio.

HUNGARA POPOLO ★

DE LA CENTRA POTENCO

Ora forinto de Karlo Roberto

Braŝovo), de kie la dogano grave riĉigis la reĝan trezorejon. Eĉ la papo devis pagi la doganon pri la ricevitaj kaj al Romo liveritaj trezoroj. La eklezia potenco, la pastra influo estis repremita dum regado de Karlo, kiu ne hezitis okaze meti sian manon sur la ekleziaj riĉaĵoj. La intervenoj far la papo fiaskis; delonge Karlo nur sian kandidaton lasis enoficigi kiel episkopon.

Kaj la ekleziaj, kaj la ceteraj bienuloj klopodis daŭre levi la tributojn prenitajn de la servutuloj, parte pro siaj altiĝantaj bezonoj, parte pro la kreskanta produktado sur la kampoj. La monsumojn, kiujn la servutuloj enspezis per siaj varoj, la sinjoroj depostulis kiel tributon, anstataŭ la tradiciaj naturaĵoj. La eblecoj de la kampuloj tamen ne povis esti egalaj varon produkti kaj vendi, sekve eta parto de la servutuloj iĝis riĉa, aliaj — laŭtavole — pro la kreskanta ekspluatado malgajnis, mizeriĝis, poste eĉ amase forlasis la vilaĝon, kiu dezertiĝis. Apud tia fuĝo desub la feŭdaj premoj aperis jam opono kontraŭ la eklezio, forta piliero de la feŭda regado: la *herezo*. La „flagelantoj" konsideris superflua la eklezian ordon, ties riĉaĵon, ribelis kontraŭ la tributpostuloj de la eklezio; la „Valdanoj" (Valdens) agadis inter la urbanoj en okcidento, kaj atakis la religiajn dogmojn, okupis bienojn. La feŭda klaso defendis sin per apartaj tribunaloj kontraŭ-servutulaj, per sinjora rajto je mortpuno, pendigo, eĉ pere de inkvizicio.

La filo de la progresema *Karlo*, Anjou, la reĝo *Ludoviko la 1-a* (1342—1382) tute male, ol sia patro, disipis la fortojn de la ŝtato, pere de dinastiaj, konkeraj militiroj. Post murdo de sia frato, edzo de Johana, reĝino de Napolo, Ludoviko dufoje militiris kontraŭ Napolo, tamen li ne sukcesis akiri ties tronon. Grave malutilis la portempe sukcesaj militiroj kontraŭ Dalmatio kaj aliaj Balkanaj landoj ĝuste tiam, kiam la osman-turka imperio de sudo jam ekminacis ĉiujn landojn en tiu parto de Eŭropo, inkluzive Hungarion. En 1370 realiĝis persona unio de Hungario kaj Pollando, kie oni elektis Ludovikon *ankaŭ pola reĝo*. De tiam Hungario restis — ĝis la unua mondmilito — ĉiam en persona unio kun iu alia Mez-Eŭropa lando (Germanio, Aŭstrio, Ĉeĥlando, laŭvice traktotaj) plejparte pro celoj dinastiaj, tamen ankaŭ pro sindefendo kontraŭ la turka okupado interligis sin la najbaraj landoj dum la jarcentoj.

Interne de la lando firmiĝis dumtempe la feŭdaj ordoj. Apud la ordoj de la baronoj kaj de la ĉefpastroj, kreiĝis la ordo de — ĉiuj aliaj — nobeloj, precipe pro la bezonata rezistado kontraŭ la tro-influaj baronoj kaj ekleziuloj. En 1351 landa asembleo *dekretis* la „identajn nobelajn rajtojn" por ĉiarangaj nobeloj, fortikigis tiucele la nobelan departementon kiel organizon, krome — malfeliĉe — malebligis vendi la nobelfamilian heredbienon. Tiuj rezolucioj poste iĝis firmaj fundamentoj por la tuta nobela klaso — ĝis la burĝa revolucio en 1848!

En periodo de Ludoviko estis skribita la *Ilustrita Kroniko*, historio ekde la patrujokupo, enhavante majstre pentritajn inicialojn kun



Statuo de St. Georgo en Prago Verko de fratoj Kolozsvári (1373).

aparta dokumenta valoro. Lernejoj plimultiĝis kaj disvastiĝis la scio de lego — skribo, kaj kune kun la ekonomia disvolvo, kompreneble ankaŭ la aritmetiko. La gotika stilo regis en la arkitekturo, eĉ ĉe urbaj loĝdomoj; ili prezentas sin en Buda-burgo — kien Ludoviko transmetis sian rezidejon — (helpe de la restarigoj arkeologiaj) ankaŭ nuntempe por la vizitantoj.

Miniaturo de la Ilustrita Kroniko: la batalo ĉe Rozgony

Hungara-bulgara kooperativa kontrakto — per kaj en Esperanto

Interesa iniciato disvolviĝas inter la kooperativaj centroj de la urboj *Várpalota (Hungario)* kaj *Kubrat* (Bulgario). La *Konsuma Kooperativo* de Kubrat kaj la *Laborista Kooperativo „György Thuri"* de Várpalota — dank' al la laborado de du esperantistoj: Anton *Antonov* kaj Sándor *Kovács* — kontaktis unu la alian, kaj la kontaktiĝon baldaŭ sekvis persona renkontiĝo inter la gvidantoj en Kubrat. Dum tiu ĉi renkontiĝo estis skizitaj la eblaj terenoj de la estonta kunlaborado, kaj naskiĝis interkonsento pri tio, ke la *oficiala lingvo de la kontaktoj estos Esperanto.*

Somere de la kuranta jaro la kooperativaj gvidantoj de Kubrat reciprokis la viziton de siaj hungaraj kolegoj. Ili konatiĝis kun la du ĝeneralaj magazenoj de la Laborista Kooperativo, kaj kompreneble ankaŭ kun la vidindaĵoj de la urbo Várpalota kaj de ĝia regiono.

Dum tiu ĉi vizito estis ellaborita la detala kaj preciza projekto de la plua kunlaborado. La kontrakton — kies oficiala teksto estis redaktita nur en Esperanto — por la hungara partio subskribis prezidanto de la direkcio, László *Kálmán* kaj Józsefné *Pécsi*, sindikata sekretario. Por la bulgara partio subskribis la dokumenton direktoro Mihail *Ĉukov*, kaj Pejĉo Rusev, sindikata sekretario. La akton de la subskribo ĉeestis ankaŭ la du esperantistoj-iniciatintoj.

La reprezentantojn de la du kooperativoj, kaj ankaŭ la iniciatintojn de la kontrakto, la 20-an julio akceptis en Budapeŝto d-ro József *Pál*, sekretario de la Tutlanda Konsilantaro de Kooperativoj. D-ro Pál en *esperantlingva* parolado emfazis la gravecon de la kontrakto, primemorante ankaŭ la 30-jaran jubileon de la hungara—bulgara interŝtata kontrakto de amikeco. Li konigis al la bulgaraj gastoj la laboron kaj celojn de la hungaraj kooperativoj. Li menciis pri la intertraktoj inter la Tutlanda Konsilantaro de Kooperativoj kaj Hungara Esperanto-Asocio, rezulte de kiuj kreiĝos komuna komisiono, kies celo estos akceli la lernadon de Esperanto inter la laboristoj kaj oficistoj de la hungaraj kooperativoj.

Revenante al la unua peresperanta hungara—bulgara kontrakto, d-ro Pál ĝoje salutis la fakton, ke tiu kontrakto krom ekonomia kunlaborado celas ankaŭ kulturajn interŝanĝojn, kaj nome de la Tutlanda Konsilantaro de Kooperativoj li promesis subtenon por la efektivigo de la kontrakto.

Árpád *Abonyi-Nagy*

esperanto

NE ISSN 0014-0635

revuo kun renomo • inter la plej malnovaj • inter la plej modernaj • la plej legata • aktuala • fidinda • akurata

esperanto

- Monata revuo de Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun Unesko).
- La sola Esperanta periodaĵo, kies legantaro (en preskaŭ 90 landoj) nombriĝas kvincifere.
- Ĝia nomo estas tiel ĝenerala, ĉi-onampleksa, ĝuste kiel ĝia enhavo: Ĝi raportas pri ĉio sciinda el la aktuala vivo de la Esperanto-movado.

  La revuo eniris sian 71-an eldonjaron. Aferoj, kiuj ne valoras, ne vivas tiel longe.
- Neniu alia Esperanta periodaĵo liveras al vi tiom da paĝoj jare (264 kun kovriloj) por tiel malalta abontarifo.
- Abonprezo: 33,00 nederlandaj guldenoj. Perantoj en pli ol 30 landoj akceptas abonojn ankaŭ en la koncerna landa valuto.
- Petu specimenon de vialanda peranto aŭ rekte de: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176., NL—3015 BJ Rotterdam, Nederlando:
- Hungaroj povas aboni ĝin ĉe HEA kontraŭ 120 forintoj.

Antal Czinder

Antaŭ sep jaroj oni aranĝis en Budapeŝto la I-an Internacian Bienalon por Malgrandaj Skulptaĵoj, kaj ĉi jare ni vidis la plej novan ekspozicion. Mi opinias, ke ebleco, aranĝi regule ĉi tiun festan arteventon, signifas ankaŭ la rekonon. Interese, ke en tiuj aranĝaĵoj unu el la plej eminentaj ĉefrolantoj estis la medaloj.

Antal Czinder (naskiĝis en 1937) estas vera majstro de medaloj. Li verkis jam multajn grandformatajn skulptaĵojn, oni povas vidi ilin en Budapeŝto kaj diversaj hungaraj urboj, muzeoj, tamen estas lia ĉefa artspeco la medalo. Mi pensas, ke estas fortprovo por skulptisto fari talentan, belegan verkon en grandeco nur kiel manplato. Czinder apartenas al la plej talentaj hungaraj skulptistoj, por kiuj manplato estas sufiĉa loko krei portreton, parton de urbo aŭ tutan pejzaĝon. Bone ilustras ĉi tiun grandan virton la tri medaloj: *Sándor Petőfi* (10 cm), *Strateto* (10 cm) kaj *Ĉe la rivero* (12 cm). Originalajn trajtojn de la mondfama poeto, Petőfi, dagerotipo konservis por ni; la medalo kompreneble similas al la malnova fotografio, tamen ĉi tiu portreto spegulas ne nur la vizaĝon de Petőfi, sed ankaŭ lian poezian talenton kaj historion, kiun li rolis en la hungara liberbatalo 1848—49. Jes, kiuj scias ĉion pri Petőfi, ili povas diri, ke la medalo estas adekvata portreto.

Kaj la *Strateto*? Ne estas admirinda, vere artbravuro, ke sur mankavo da spaco estas alvokinta eble la tuta vivo? Ja estas ĉi tie antaŭ niaj okuloj la urbo kaj ĝiaj loĝantoj, eĉ ankaŭ la sortoj de homoj. La atmosfero de la medalo estas kiel la vera vivo mem, ĉu ne?

Kaj *Ĉe la rivero*? Estas kune kun la tuta naturo: la tero, rivero, aero kaj homo, bestoj. La iluzio estas perfekta, senmanka.

Estas kompreneble, ke la medalojn de Antal Czinder oni prezentis ne nur en Hungario, sed ankaŭ en Parizo, Belgrado, Sofio, Moskvo, Prago, Helsinki, Krakovo, Berlino.

Mihály *Gergely*

Sándor Petőfi



Ĉe la rivero

▼ *Strateto*



MAL EKVILIBRO

Malgrandaj popoloj bone scias, kiel malfacile estas konigi sian literaturon al eksterlando, kvankam ĉiuj kleraj homoj en la mondo konsentas, ke la kvalito de iu literaturo neniom dependas de la nombro de la parolantoj de tiu lingvo, en kiu ĝi estas verkita.

Analizante la nombron de la literaturaj tradukoj, faritaj el la hungara, ni renkontas iom kontentigan bildon nur en la libroeldonado de la socialismaj landoj: dum la jaro 1977 en tiuj landoj aperis 96 verkoj de hungaraj aŭtoroj.

Signife malpli bona estas la situacio de la hungara literaturo en la landoj de Okcidenta Eŭropo. Dum la pasinta jaro eldoniĝis en Britio nur *unu* verko tradukita el la hungara; dum la sama jaro en Hungario aperis 21 libroj de britaj aŭtoroj. Ni konscias, ke la t. n. malgrandaj kulturoj evidente ne povas ekvilibri sian importon kaj eksporton, tamen tia „deficito" ŝajnas iom maljusta. Staru ĉi tie kelkaj ciferoj pri la nombro de elhungarigitaj verkoj en kelkaj landoj (parenteze staras la hungara „importo" el la koncerna literaturo): FRG — 5 (14) Francio — 5 (17), Usono — 4 (30). En Okcidenta Eŭropo kaj Norda Ameriko eldoniĝis sume 38 verkoj, tradukitaj el la hungara. (Ĉiukaze, eĉ tiu magra cifero montras progreson: dum la jaro 1976 oni eldonis en tiu trideko da landoj nur 27 hungarajn verkojn.)

Nur la hungaraj teatraĵoj havas iom pli bonan ŝancon: en la jaro 1977 Okcident-Eŭropaj teatroj prezentis 12 hungarajn dramojn, dum la hungaraj spektantoj povis aplaŭdi al 17 teatraĵoj de Okcident-Eŭropaj dramverkistoj.

„La sola demokratia kaj praktika solvo"

Intervjuo kun Jack Jones, honora prezidanto de TUCEG

Inter niaj legantoj vekis grandan reeĥon nia artikolo aperinta en HV 78/1 sub titolo: „Sindikata kaj kooperativa iniciato". Aktivaj uzantoj de la internacia lingvo, ankaŭ amikoj kaj simpatiantoj kun aparta ĝojo akceptis la sciigon pri la fondiĝo de TUCEG.

La laborista movado kaj la dua lingvo

Kiel nia artikolo konigis: TUCEG — plennome *Trade Union and Co-op Esperanto Group* —, t. e. Sindikata kaj Kooperativa Esperanto-Grupo fondiĝis komence de la pasinta jaro kun la celo: inter organizitaj laboristoj kaj kooperativaj membroj popularigi la internacian lingvon. Plue por tio, ke: (TUCEG) „deziras akiri apogon de la laborista klaso en la intereso de Esperanto, por ke ĝi povu plenumi en ĉiu lando rolon de dua lingvo." Ilia alvoko eĉ emfazante substrekas tiun ilian agnoskon, ke: *„La laborista movado devas aktive apogi Esperanton, la solan demokratian kaj praktikan solvon de lingvaj problemoj de l'mondo."*

Jack Jones, honora prezidanto de TUCEG

La gravecon kaj internacian signifon de iliaj celadoj faras, ke TUCEG ekestis en patrio de la relative plej disvastiĝinta mondlingvo kaj laŭ iniciato de sindikatoj; kaj krom prezidantoj de la 12 grandaj tutlandaj sindikatoj respektive krom kooperativaj gvidantoj al ĝia prezidantaro apartenas ankaŭ ĉefsekretario de la Brita Laborista Partio, prezidanto kaj ĉefsekretario de la Komunista Partio, ktp.

La honora prezidanto de TUCEG estas Jack Jones, ĉefsekretario de la plej granda kaj influhava brita sindikato. tiu de „Transport and General Workers Union", havanta du milionojn da membroj.

Ĉar li, kiel aŭtoritata persono de la laborista movado kaj de socia vivo ankaŭ persone havis grandan rolon en fondo de TUCEG — mi petis intervjuon de li perletere.

De la hispana civitana milito – ĝis la angla Honorlegio

Antaŭ ol konigi miajn demandojn kaj la ricevitajn respondojn, — mi devas iom prezenti la honoran prezidanton, veteranon de la laborista movado, kiu jam en la hispana civi-

tana milito batalis flanke de la hispana respublika armeo kontraŭ la italaj kaj germanaj faŝistoj. Kiel ĉefsekretario de la sindikato, pasintjare li emeritiĝis, tamen restis plu unu el la plej rekonataj gvidantoj de la tutlanda gvida organo de sia sindikato, kaj tiu de la sekretariato de Ĉefkonsilantaro de Brita Sindikata Kongreso. Okaze de sia emeritiĝo li ricevis la plej gravan anglan ordenon, tiun de Honora Legio. Por agnoski liajn meritojn la reĝino proponis al li ankaŭ dumvivan membrecon en Ĉambro de Lordoj — sed tion li rifuzis kiel neakordigeblan kun lia maldekstrula partopreno en la laborista movado.

Laŭ tiuj faktoj por ni estas honoriga la intervjuo donita de li.

Komenciĝis en la haveno de Liverpool

Demando: Niajn legantojn interesus: ekde kiam Vi estas amiko de la internacia lingvo?

Jack Jones: Ekde tiam, kiam en mia aĝo de 17 jaroj en la haveno de Liverpool ni organizis Laboristan Kolegion por kleriga kaj movada eduko. Jam tiutempe mi renkontis laboristojn de diversaj eksterlandaj ŝipoj kaj la intenco por interkompreniĝo trovis grandajn malfacilaĵojn, lingvajn barojn. Evidentiĝis por mi bezono de internacia lingvo. Mi ekinteresiĝis pri Esperanto, kaj en la Laborista Kolegio poste ni studis ĝin.

Pro miaj okupitecoj mi ne enprofundiĝis en ĝi, tamen restis mia konvinkiĝo, ke signifo de la internacia lingvo estas grandega, kaj ĝi efike povas kontribui al internacia kompreniĝo de laboristoj de l' mondo.

Demando: Kiaj en- kaj eksterlandaj spertoj en la sindikata kaj laborista movado instigis Vin por esti unu el la ĉefaj iniciatantoj de TUCEG?

Jack Jones: Kiel kreskis miaj movadaj taskoj — tiel ĉiam pli ofte mi devis fari kontaktojn kun sindikataj gvidantoj de aliaj landoj; kaj mi havis la honoron reprezenti la britan sindikatan movadon. Do mi akiris abundajn spertojn pri tio, ke la interpretado el unu lingvo al alia estas malrapida procezo kaj ĝi malfaciligas la interkompreniĝon. Tiaj spertoj nur plifortikigis mian rekonon, ke nur pere de disvastigo de Esperanto ni sukcesus rezultplene pliboni la internaciajn kontaktojn en la laborista, respektive sindikata movado. Eble atingo de tiu celo estos procezo longedaŭra, tamen mi kredas, ke ni atingos ĝin.

„Mia sincera respekto por viaj deklaroj"

Demando: Kiel Vi opinias koncerne nian artikolon pri TUCEG, kaj pri la samnumere publikigitaj deklaroj de hungaraj sindikataj kaj kooperativaj gvidantoj?

Jack Jones: Mi deziras esprimi mian sinceran respekton koncerne viajn artikolon kaj deklarojn. Estas grandioza sento scii, ke en Hungario estas tiel granda la interesiĝo pri Esperanto. Mi multfoje renkontiĝis kun hungaraj sindikataj gvidantoj, inter ili mi havas multe da amikoj. La pli frua deklaro de Sándor Gáspár, respektplena gvidanto de hungaraj sindikatoj — forte influis min. Li estas mia amiko, alte taksata en la tutmonda sindikata movado.

Demando: Ĝis nun kiom da sindikataj membroj kaj funkciuloj aliĝis al TUCEG?

Jack Jones: Estas ankoraŭ malfrue paroli pri konkreta efiko de TUCEG, certas nur tio, ke ĝia influo havas ĉiam pli kreskantan tendencon. Estas bezonata longa tempo ĝis ĝi fariĝos forta organizaĵo. Sed eĉ ĝis tiam konsciaj agantoj en la Esperanto-movado kaptas ĉiun okazon por veki simpation kaj interesiĝon inter laboristoj kaj sindikatanoj. Mi kredas je baldaŭa kresko de influo de TUCEG en Granda Britio.

Europa ebleco en 1979

Demando: TUCEG kaj la aliĝintaj sindikatoj kian instru-agadon faras? Ĉu vi disponas pri sufiĉe da instruantoj, lernolibroj kaj vortaroj?

Jack Jones: Bedaŭrinde egale mankas kaj bone kvalifikitaj instruistoj kaj lerniloj. Sed la fakto, ke ni komencis tiun movadon, certe rezultigos ankaŭ eldonon kaj disvastigon de lerniloj kaj helpos al ekirigo de lingvokursoj gvidataj de bone instruitaj prelegantoj.

Demando: Ĉu vi opinias ebla, ke la sindikatoj, apogantaj TUCEG-on — helpu eventualan traktadon pri Esperanto en la venonta konferenco de Eŭropaj sindikatoj?

Jack Jones: Mi esperas, ke okaze de la Tut-Eŭropa Sindikata Konferenco en la jaro 1979 la diversaj Eŭropaj sindikatestroj havos eblon por debati pri disvastigo de Esperanto-instruado. Donus vere efikan instigon al plejparto de organizitaj laboristoj kaj sindikataj funkciuloj, se la Tut-Eŭropa Konferenco montrus tendencojn de ebloj koncerne disvastigon de Esperanto.

*

Lia letero enhavanta la intervjuon finiĝis jene: „Kun bondeziroj kaj amika saluto: Jack Jones ĉefsekretario." Mi opinias, ke la realaj kaj sinceraj respondoj de la aŭtoritata brita sindikata gvidanto bezonas nenian komenton — eble nur tion: la tutmonda Esperanto-movado kun helpo de la sindikatoj povas atingi, ke en la spirito de internaciismo ni akiru pli da organizitaj laboristoj kaj intelektuloj por la afero de la internacia lingvo Esperanto.

Imre *Szenes*



Matena interparolado en „tendaro por legado" apud la vilaĝo Bár en departemento Baranya

Ĉu legi aŭ nelegi?

Jam pasis ses jaroj ekde la organizo de la unuaj tendaroj kies speciala temo estis la legado. Jes, la legado de literaturaj verkoj, la malkovro de ĉi tiu ĝojo ja ne estas ankoraŭ ĉies proprajo.

Je iniciato de kelkaj junaj verkistoj ekiris ĉi tiu movado kaj ĉisomere jam 80 tendaroj akceptis adoleskajn geknabojn plejparte el etaj vilaĝoj, farmoj, aŭ el familioj en kies hejma atmosfero la infanoj fariĝis spirite malpli evoluintaj kaj timemaj.

Du semajnoj, kompreneble ne faras miraklojn, sed malfermas la interesiĝon pri artoj, sociaj demandoj, vekas la aktivecon kaj kuraĝigas timemulojn por partopreni en diskutoj. Ĉefa kondiĉo de la sukceso estas la personeco de la gvidantoj. Ili devas esti homoj tre multflankaj kaj krom la ĝenerala instruiteco kaj psikologiaj konoj ili devas havi grandajn paciencon kaj komprenemon al la infanoj. Aparta forto de la movado estas, ke amase ĝi tiris al si tiajn homojn. Dank' al ili en la pasintaj ses jaroj miloj da gelernantoj de „malavantaĝa situacio" eksentis bonan guston de la legado, de la artoj kaj ekiris la vojon de pli perfekta homa vivo.

La centro de la lando

La Geodezia kaj Kartografia Entrepreno surbaze de precizaj mezuradoj kaj kalkuladoj, difinis la geometrian centron de Hungario. Ĝi situas apud la vilaĝo Pusztavacs (pron.: Pustavaĉ) en departemento Pest, proksime al la ĉefŝoseo n-ro 5. Super la ŝtono, lokigita sur ĉi tiun punkton, komenciĝis la konstruado de 10 metrojn alta piramidforma turo el armita betono. Sur ĝia supro kupra globo signos la gravan punkton. Sur la malsupra parto de la turo estos lokigita tabulo kun la geografiaj kaj karakterizaj astronomiaj indikoj pri la geometria centro de la lando.

PANO

Distingo de m

Pál Kadosa, komponisto kaj profesoro de la Muzika Altlernejo de Budapeŝto, kiu jam dufoje ricevis Kossuth-premion, nun estis distingita per la Ordeno Ruĝa Flago de Laboro okaze de lia

Zoo-lernejo

La Zoologia Ĝardeno Mecsek (apud la sudhungarlanda urbo Pécs) organizas „zoo—lernejon" por 10—14 jaraj bazlernejanoj interesiĝantaj pri biologio. En dekpersonaj grupoj ili alterne vizitadas la zoon kaj dum du semajnoj ekkonas la vivon de bestoj, kaj la zorgadon pri ili.

D-ro István Fülöp, direktoro de la Zoo M



RAMO

uzikpedagogo

75-a naskiĝtago. Pál Losonczi, prezidanto de la Prezidia Konsilio transdonis la honormedalon al la eminenta artisto, kiel rekonon por lia elstara komponista kaj artpedagogia agado.

Pál Losonci, prezidanto de la Prezidia Konsilio transdonas la honormedalon al Pál Kadosa

Kultura kontrakto hungara-Malta

S-ino Agatha Barbara, ministro pri kulturaj aferoj de Respubliko Malta kaj Rudolf Rónai, prezidanto de Instituto por Kulturaj Interrilatoj subskribis kontrakton laŭ kiu la registaro de ambaŭ landoj akcelas ĉiujn agadojn, kiuj kontribuas al la kultura kaj scienca evoluo de la alia lando. Reciproke disponigas stipendiojn unu al la alia. Tian kontrakton nun unuan fojon subskribis reprezentantoj de Hungario kaj Malto.

Agatha Barbara kaj Rudolf Rónai post la subskribo de la kontrakto

...sek kun unu el la »zoo-lernejanoj«



Kontraŭ alta sangopremo

La Mondfederacio de Sanitaro ĉi tiun jaron deklaris jaro de lukto kontraŭ hipertensio. En ties kadro — je hungara iniciato — komenciĝis larĝskalaj ekzamenoj ankaŭ ĉe gejunuloj. Laŭ la planoj sangopremo de 35—40 mil adoleskuloj estos registritaj en Sovetunio, Kubo, GDR kaj Hungario. La plurjaran laboron kunordigas la Hungarlanda Kardiologia Instituto.

REVUO DE REVUOJ

Omaĝe al LAJOS TÁRKONY kreinto de tiu ĉi rubriko, viciĝas jen la nigraj literoj, arde ŝatitaj de lia erudicia spirito. Ĉiam mallaŭta kaj sinretena, iomete raŭka voĉo de la mildanima poeto resonas en mia memoro, lia „plenda plor' " ekskuas, kiam mi foliumas malnovajn revuojn por denove legi liajn versojn:

Kiel iam la febre fajran frunton
la panja mano tuŝis freŝigante,
enlulu min per kanto pacosterna,
kaj sur l'animon lacan falos lante
la songo' eterna.

Al lastulo de la Literatura Mondo — nian funebran adiaŭon

el Viaj vortoj Vin mem
ke ni rekolektu —
Sed Vin reteni povas nenia
„Resurektu!",
mi vane al Vi kaptas
tra l'densiĝa nebulo.

* * *

La serĉado kaj strebo al fortigo de nacia identeco kontraŭ fortegaj kulturaj penetradoj, kontraŭ imperiismaj detruoj, i. a. *ankaŭ kontraŭlingvaĵ*, ĉiam trovas konvenan subtenon en nia movado. Nun VENEZUELA STELO levis sian voĉon favore al la nacia identeco Venezuela, en larĝhorizonta artikolo, kiu estis esceptmaniere — nepre laŭdinde — publikita paralele hispane kaj Esperante. El la kulturfundo de la indianaj socioj originas tie la nacia kulturo; dum jarcentoj aliĝis laŭgrade Eŭropaj kaj Afrikaj trajtoj; eĉ kolonieca misformado: tamen nenio povis forviŝi la praan kaj aŭtentikan naciecon, ties bazajn faktorojn. Por fruktodona antaŭenirado, por socia transformiĝo necesas rekonstrui la nacian identecon ekde la bazo — jen la ĉefaj ideoj esprimitaj de prof. E. *Mosonyi* malkaŝe, luktante *per* nia lingvo *por* sia leviĝanta nacio.

INTERNACIISTO el Vieno prenis novajn formaton kaj presteknikon post la jam fama sukcesa rezolucio de la Kongreso de KP Aŭstria. Tie voĉdonis *223 delegitoj favore al Esperanto*, kaj nur 13 estis kontraŭ ĝi! Impresas la redaktora konduto, esprimita de Franz *Schick:* „lojale labori por la bono kaj sukceso de E-movado, sen altrudi nian ideologion kaj partion... ja la unueco de la E-movado estas antaŭ ĉio tre kara kaj ne tuŝebla". Fakte lia gazeto plenumas necesajn taskojn per sincera tono kaj verva argumentado, kies modelon ni trovis en la senvualiga laŭfakta raportaĵo pri Argentino, la lando de la piedpilk-mondĉampionado.

Impresaj kulturaj eventoj estas traktataj en la somera duobla revuo ESPERANTO: teatroj en Gdansk, pupteatro-sukcesoj en Tromsö, k. a. La vizitinto de UK en Rejkjavík, *M'Bow* de Unesko en Lucerno antaŭ fremdlingvoinstruistoj emfaze asertis evidentan, tamen de multaj ne komprenatan fakton: la amasaj komunikad-rimedoj ne povas esti neŭtralaj. Li iris plu: *la teknologio kaj la aplikitaj sciencoj* same ne efikas neŭtrale, ĉar ili spegulas la vivmanieron de la socioj, kiuj produktis ilin. Enkondukante ien ajn sciencon, teknologion, oni devas ŝirmi la progresemajn tradiciojn kaj valorojn de la akceptanta socio — avertis M'Bow — kaj tiurilate la uzita lingvo havas decidan rolon. Eminente! Sen movada memflato ni rimarkas ĝuste tiujn ideojn, kiuj troviĝas en argumentaro de la esperantistoj jam delonge... Aŭ vidu supre la alineon pri la Venezuela Stelo; alrimas ankaŭ la cirkonstancoj de la furoro de IL en Irano, ktp. Praviĝas niaj tezoj en la reala mondo, kaj tio alproksimigas la venkon, jam forte bezonatan de la mondo.

Ĉe alia paĝo de tiu numero, mi preskaŭ kolapsis ekvidinte la titolon: Kalocsay — diletanto (!?), eĉ se „kolosa"??? Mi ne volas mediti groteske, ĉu la epiteto „kolosa" alten kvalifikus la diletantecon, aŭ male deprenus de ĝi por kompensi la negativecon. Eĉ malpli mi havas intencon ĉirkaŭbari gardeme ian piedestalon. Tiun ĝuste la artikolanto Reto *Rossetti* fortikigas — rajte — por Kalocsay, laŭdante lin: bardo suverena-tuŝanta apogeojn — la plej bona poemaro en Eo *(Streĉita kordo)* — trenis la tutan E-an poezion sur pli altan ŝtupon, ktp, ktp. Enigma kontrasto! Eble bombasto? Ŝajnas al mi, ke temas pri tro arbitra kontraŭstarigo de „naskiĝintaj" kaj „memfaritaj" poetoj; ĉilastaj estas konsiderataj — kial, kial ne? — de la aŭtoro simple *diletantoj.*

Oftan fenomenon almontras perfingre Franko *Luin,* redaktoro de la sveda LA ESPERO, okaze de ies riproĉo al la sveda federacio: se iu esperantisto *faras* movadan agon, organizadon aŭ alian, tio estas *plenumo de la asocio.* Ja, la asocio estas ankaŭ Vi!

Simile alvokas precipe junajn ondoĉasistojn agi individue por E-disaŭdigoj, la DX-INFORMILO de la Esperanto-DX-Klubo en Munkeno. La kolektivan agadon de la klubo — temas pri sonbendkasetoj, flugfolioj k. s. laŭcele plektas individuaj agoj de anoj, kiuj varbas aliajn radioĉasistojn por ke ili renkontu la eblojn de Eo: senpere kontaktiĝi kun la vasta mondo.

Ervin *Fenyvesi*



Malfermo de la Konferenco. Ĉe la tablo de maldekstre: D-ro István Szerdahelyi, fakestro de Esperanto en la katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, Endre Barát, parlamentano, vicprezidanto de HEA, profesoro István Szathmári, dekano de filologia fakultato, D-ro János Balázs, estro de katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, honora prezidanto de HEA.

Kunvenis specialistoj el dek du landoj

Internacia Interlingvistika Konferenco en Budapeŝto

Okazis antaŭ du jaroj, en 1976, kiam la Esperanto-fako de la Universitato „Eötvös Loránd" aranĝis jubilean interlingvistikan seminarion, por festi la dekjaran ekziston de la fako. En la antaŭpreparoj la aranĝantoj estis instigataj, konsilataj kaj helpataj de profesoro Géza *Bárczi*, kiu entuziasmiĝis pro la penso, inviti al Budapeŝto por serioza kunveno diversnaciajn fakulojn de interlingvistiko, kaj tiel antaŭenpaŝi en la scienco de internacia lingvo.

Profesoro Bárczi bedaŭrinde jam ne vivis, kiam realiĝis la aranĝajo, kies sukceso instigis la organizantojn al la ripeto de la seminario en pli alta nivelo, en formo de konferenco, kun pli da eksterlandaj partoprenantoj. Tio efektiviĝis nun, inter la 23—28-a de julio en Budapeŝto: la I-a Internacia Interlingvistika Konferenco rememoris ankaŭ la neforgeseblan hungaran lingviston, profesoron Bárczi, fervoran amikon kaj adepton de la internacia lingvo, sindoneman apoganton de la Esperanto-fako.

Kial la I-a? Ĉar — kvankam okazis jam similtemaj aranĝajoj dise en la mondo — tio estis la unua interlingvistika konferenco, kiun oficiale gastigis ŝtata universitato; kaj ties Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko.

Fakuloj, ĉefe universitatanoj kaj sciencaj esploristoj el dek du landoj: Jugoslavio, Pollando, Nederlando, Germana Demokratia Respubliko, Ĉeĥoslovakio, Usono, Norvegio, Svedlando, Germana Federacia Respubliko, Israelo, Italio kaj Hungario, dum kvar labortagoj prelegis, diskutis kaj konversaciis pri la ĉefaj demandoj kaj aktualaj zorgoj de interlingvistiko, esperantologio, aplikata lingvistiko, tradukscienco.

Jen kelkaj nomoj el la plej konataj kaj iliaj prelegoj: Carlo *Minnaja* (Italio): „La uzado de matematiko en lingvistiko" Jaromír *Jermář* (Ĉeĥoslovakio): „Etnologio kaj interlingvistiko", Detlev *Blanke* (GDR): „Komparo de etno- kaj planlingvo", Jonathan *Pool* (Usono): „Bazaj ecoj de lingvopolitiko", Verloren van *Themaat* (Nederlando): „La internacia vortaro kaj ĝia signifo por la dezirinda formo de planlingvo", Gyula *Ferenczy* (Hungario): „La tradukado kiel lingvistika problemo", Fabrizio *Pennacchietti* (Italio): „Determino kun kaj sen artikolo en Esperanto", ktp.

Jam la solena malfermo donis veran interlingvistikan karakteron al la konferenco, ĉar sian inaŭguran paroladon la dekano István Szathmári faris en la franca lingvo, kun tuja tradukado al Esperanto; kaj profesoro János Balázs, estro de la katedro sinsekve parolis en la franca, itala kaj fine, kiel surprizo — en Esperanto. Tiu multlingveco iom daŭris ankaŭ poste, ĉar okazis prelegoj ankaŭ en la angla kaj itala, ĉiam kun samtempa tradukado, sed la ĉefa laborlingvo — krom la hungara — restis Esperanto. La italaj, Veneciaj lingvistoj — ne-esperantistoj — eĉ notis, ke ili neniam pensus, ke Esperanto estas jam tiom disvastiĝinta lingvo, pli ol la itala..

Fine: la partoprenintoj decidis fari tradicion el la konferenco, ĉar la lastan tagon de la aranĝajo ili konsentis pri la kreo de internacia komitato de lingvistoj, kiu antaŭpreparas la II-an Internacian Interlingvistikan Konferencon, okazontan post du jaroj en Venecio: la oficiala aranĝanto estos la Venecia Universitato.

Komenciĝis io nova: plej gravas, ke la daŭrigo estas certigita.

Zsuzsa *Varga-Haszonits*

REZOLUCIOJ DE LA 1-A INTERNACIA INTERLINGVISTIKA KONFERENCO:

1. **La Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko de ELTE publikigos libroforme la materialon enhavantan la 28 prelegojn de la 1-a Interlingvistika Konferenco.**
2. **La partoprenantoj de la 1-a Internacia Interlingvistika Konferenco decidis, ke la 2-a Konferenco okazos en Venecio, Italio, en la jaro 1980. La oficiala aranĝanto de la 2-a Konferenco estos la Venecia Universitato. La kadrotemoj de la 2-a Internacia Interlingvistika Konferenco estos la sekvaj:**
   a) Interlingvistiko kaj lingvaj minoritatoj,
   b) Interlingvistiko kaj tradukscienca teorio,
   c) Interlingvistiko kaj esperantologio.
3. **La 1-a Internacia Interlingvistika Konferenco rezoluciis pri starigo de Internacia Interlingvistika Organizajo, kiel fakkomitato de la Internacia Organizajo de Aplikata Lingvistiko. La Konferenco komisiis al Jonathan Pool, ke en la sekva Montreala Konferenco li proponu ties pridiskuton kaj pri tio informu la Venecian, resp. la Budapeŝtan Universitatojn.**
4. **Por antauprepari la 2-an Konferencon, resp. por organizi la Internacian Fakkomitaton la Konferenco starigas antaupreparan laborkomitaton, kiu havos sep italajn, sep hungarajn, kaj sep diversnaciajn, entute dudek unu membrojn.**



Akvonodo ĉe Kisköre

Medioprotektado en Hungarlo

IRIGACIO GRAVA FAKTORO DE AKVOEKONOMIO

D-ro Ferenc László

Konata fakto estas, ke la agrokulturan produktadon, kaj en ties kadro unuavice la vegetalkultivadon eksterordinare influas la naturaj cirkonstancoj: klimato kaj la grundo-proprecoj. En ambaŭ havas grandan rolon la akvo, varie estanta al dispono tempe kaj loke. Ĝi estas baza elemento en la planta vivo kaj tial estas grava faktoro de la kultivado de vegetaloj.

Natura fonto de la grunda akvo estas la precipitaĵoj,* kiuj bedaŭrinde — sur multaj teritorioj de la Tero — ne povas certigi la optimuman staton deziratan por la vegetalkultivado. La irigacio servas por anstataŭigi la mankantan natur-akvon. Sur granda parto de la agrokulturaj terenoj la naturaj akvokvantoj ne estas proporciaj al la akvopretendoj de la plantoj, resp. al la dezirata optimuma akvo-stato de la grundo, tial la irigaciado ĉiam estis kaj estos nemalhavebla rimedo de la agrokultura produktado kaj per tio servas ankaŭ la nutraĵprovizadon de la homaro.

Sur sekaj, aridaj** teritorioj, kie la jara precipitajkvanto ne atingas eĉ la deziratan minimumon, la irigacio estas nemalhavebla kondiĉo de la agrokultura produktado. Sur tiaj lokoj ne eblas plantokultivado sen irigacio.

Sur pli humidaj teritorioj, respektive tie, kie la sekaj kaj malsekaj jaroj aŭ sezonoj alternas, la tasko de la irigacio estas pliigo de la certeco de plantoproduktado kaj de ĝia pli granda kvanto.

Resume estas konstateble, ke *la irigacio estas la plej altgrada agroteknika kulturado*, unu el la tre efikaj rimedoj por fari pli intensa la agrokulturan produktadon.

La agroteknika evoluado necesigis la irigacion ankaŭ sur tiaj teritorioj, kie la naturdonitaj akvocirkonstancoj estis kontentigaj sur konkreta nivelo de la agrotekniko, tamen ne estis ebleco por plua evoluigo. Nome kune kun la agroteknika kreskas la frukto produktita po unuo de akvokvanto. — tiel kreskas la rolo de akvo en la agrikultura produktado. Tio signifas, ke ĉiam estas disponenda la akvokvanto necesa por nivelo kaj sekureco de la agrokultura produktado.

La plej perfekta harmoniigo de la teknikaj kaj agronomiaj interesoj eblas nur kun vasta priatento de la ekonomiaj planadoj. La aktiveco kunligita kun la teknika kaj agrokultura realigo bezonas harmoniigitan esploran, projektadan, konstruan, funkciadan, organizan kaj magistratan funkciadon.

La evoluo de la irigacio sur nia Tero

La irigacio estas preskaŭ tiel malnova kiel la agronomia kulturo Laŭ *Israelsen* la irigaciado estas praa arto. La evoluo de civilizacio sekvis la evoluon de irigaciado. Laŭ opinio de la hinda *Gŭlhati* la irigacio en multaj landoj estas tiel malnova arto,, kiel mem la homa civilizacio, — kaj ĝi estas ankaŭ nuntempe moderna scienco disvastiĝinta tutmonde: scienco de la homa ekzisto. La unuaj spuroj de la irigacia ekonomiko reiras ĝis la antaŭhistoriaj epokoj. La terkulturisto vivanta sub kontinenta klimato baldaŭ divenis, ke sen akvo li ne kapablas certigi sian produktadon, viveblecon. Verŝajne mem la naturo instruis la homon pri tiu sperto, kiam tiu priatentis, ke post inundo siaj grundoj donas pli bonan rikolton. Post tio li jam mem superŝutis siajn kampojn per akvo, kiun agadon ni povas rigardi primitiva, praa formo de irigaciado. La unuaj irigacioj realiĝis en landoj sub pli varma klimato: Mezopotamio, Egiptio, Hindio, Mez-Ameriko. Ne sole tial, ke ĉi tie evoluis unue la kulturo de la homaro, sed ankaŭ tial, ĉar en tiuj landoj la provizado de la multiĝanta homaro estis solvebla nur per tiu maniero.

Pri la plej pratempaj irigaciadoj, — kiuj komencis evolui 5000 jarojn a. K., — atestas la ruinoj de irigacikonstruaĵoj en la valoj de Tigriso kaj Eŭfrato. La sumeranoj, praloĝantoj de *Mezopotamio*, utiligis la nivelaltec-diferencon de la du riveroj kaj la periodajn inundojn, por akvoelpreno kaj irigacio. Ili konstruis digojn kontraŭ inundoj laŭ la riveroj, senakvigis la marĉojn, estigis centojn da irigaciaj kaj akvoelprenaj kanaloj. Okaze de malalta akvonivelo oni elĉerpis la irigaciakvojn el la riveroj per baskulaj akvoleviloj tra pluraj ŝtupoj, kaj tiujn akvonodojn baris unu de la alia per digoj. En postaj tempoj estis jam uzitaj ankaŭ akvoradoj, norioj.

La grundo en Mezopotamio estas tre fekunda sekve de la irigacio, tial laŭ la pratempa historio la Kaldeaj reĝoj estis klarvidaj rilate gravecon de irigaciaj konstruaĵoj. Reĝo *Kudar-Mabug* (a. K. 1960—1920) postlasis surskribojn, kiuj donas sciigon pri grandiozaj kanalkonstruadoj.

El inter la kanalkonstruadoj unuavice estas mencienda la *Reĝokanalo (Naharmalka)*, kiu kunligis la riverojn *Eŭfrato* kaj *Tigriso*. La kanalo estis navigebla, ĝiaj spuroj estas troveblaj eĉ hodiaŭ. El la Reĝokanalo — kiu estis kunligita kun akvorezervujo de grandeco 60 km²-a — disbranĉiĝis plurcentoj da irigaci-kanaloj. Kune kun la dekadenco de la Mezopotamia kulturo ekiris la detruiĝo de irigacia kulturo, ruiniĝo de irigaciaj konstruaĵoj. En la kvina jc p. K. rompiĝis la digoj de la kanaloj forkiĝantaj el Eŭfrato kaj la ĉirkaŭaĵo de Babilono iĝis marĉo.

Al simile granda pasinteco rerigardas la irigacio ankaŭ en *Egiptio*, kie antaŭ pli ol 5000 jaroj estis jam komencita la disvastigo de la surflua irigacio. Oni konstruis grandiozan kanalsistemon irigacian kaj akvoellasan kun simile grandioza digaro apud *Nilo*, por utiligi la

* *precipitaĵo:* fluaj aŭ masivaj akveretoj, falantaj el la nuboj (PIV)

** *arida:* malfekunda pro troa sekeco (PIV)

inundojn de la riverego. Tiu necesa kaj sistema laboro grave influis la kulturon de Egiptio. En la 8. jarcento p. K. estis irigaciitaj per inundado 600 miloj da hektaroj, en la 13. jc. jam 1,2 milionoj. Sur la dezertaj teritorioj oni akiris la irigaci-akvon el inundoteritoriaj putoj. Eĉ hodiaŭ funkcias pr. 2000 da tiaj praaj putoj.

En *Hindio* kie ne estas malofta la duonjara sekvetero, ankaŭ estas troveblaj la praaj irigaciaj memorajoj. Laŭ tiuj jam en la 14-a jarcento a.K. oni irigaciis en Hindio kaj en 5—3. jarcentoj a.K. estis jam rekonita la graveco de irigacio, kaj ŝtataj oficistoj pro komuna intereso kontroladis la manipuladojn de irigaciaj instalaĵoj. Tiujn laborojn karakterizis la konstruado de artaj rezervo—lagoj, en kiuj estis rezervataj la precipataĵ-akvoj de la pluva sezono por la seka sezono.

La detruaj, sed samtempe produktaĵ-kreskiga efiko de la riveroj *Huangho** kaj *Jangce-Kiang** rezultis, ke jam en antikva tempo funkciis densa reto de irigaciaj kaj akvoelprenaj kanaloj en *Ĉinio*. La kanalkonstruadoj bezonis tiom multajn laboristojn, ke de tempo al tempo mankis laborfortoj malgraŭ la granda denseco de la loĝantaro. La maksimumon de la tiutempaj hidrologiaj laboroj postulis la *Imperiestro-kanalego* de mil kilometra longeco kiu konstruiĝis dum 20 jarcentoj kaj estis preta ĉirkaŭ j. 1280 p.K. La kanalo, unu el la plej grandiozaj inĝenieraj kreaĵoj de ĉiuj tempoj servis krom la irigacio ankaŭ la navigadon.

En *Japanio* jam ĉ. la jaro 600 a.K. oni pretigis por irigaciaj celoj tiajn malgrandajn kanalojn, kiuj kondukis el la montoj la akvon sur la irigaciotajn teritoriojn.

Estis trovitaj spuroj de tre evoluinta irigacia agrokulturo en *Mez-Ameriko* kaj *Peruo* dum la plej lastatempaj elfosadoj. Oni taksas ĉi tie la komencon de irigacio ĉ. 5000 a.K. En la mezaj Andoj kaj Mez-Amerika montarregiono intensa irigacia agrokulturo servis por la bono de la densa loĝantaro kaj tio kreis tiun ekonomian bazon, sur kiu konstruiĝis la civilizacio de la *Azteka* kaj *Inkaa Imperioj*. Dum la tempo de hispana koloniizado malpliiĝis la nombro de la loĝantaro, la nivelo de la agrokultura produktado malaltiĝis kaj la rolo de irigacio dekadencis signife. En *Nord-Ameriko* ni trovas la unuajn spurojn de irigacio el la 5—6. jarcentoj p.K. Kelkaj indianaj triboj sporade uzis ĝin.

* En Poŝatlaso de la Mondo: Huangho: Perla Rivero (alinome: Flava Rivero) fluanta preter Ginano (Tsinan) en la Flavan Maron: Jangce-Kiang: Jangzio unu el la plej grand-trafikaj riveregoj de Ĉinio, enfluejo al la Orienta Maro ĉe Ŝanhajo.



Akvoŝveligejo de Békés-szentadrás

En *Eŭropo* ekevoluis la irigacio relative pli malfrue. Kvankam en la Romia epoko jam estis irigaciadoj kiujn malaperigis la epoko de la popolmigrado, la disvastiĝo de la Eŭropa irigaciado komenciĝis dum la krucmilitoj kiel efiko de la pli ofta renkontiĝo kun Oriento.

En *Italio* la unua irigaci-kanalo, la *Naviglio Grande* pretiĝis en 1178, poste nova elano okazis en la XV. jc. Dum la postaj jarcentoj konstruiĝis grandega sistemo de irigaci-kanalaro sur la *Lombardia ebenaĵo* (ĉe piedo de Alpoj).

En *Francio* okazis jam irigaciadoj en la XV. jc. laŭ la rivero *Durance*, sed la gravecon de grandaj irigaciaj kanaloj oni rekonis nur en XVIII-a jc.

En *Germanio* oni komencis irigacii la kampojn en la dekdua jc. El la deksesa jc. jam estas aŭtentikaj indikoj pri funkciantaj irigacioj.

Kompetenta konanto de la historio pri irigacio, *Gulhati* opinias, ke malgraŭ la relative ampleksa irigacio en kelkaj landoj sur la tuta Terglobo la akvumitaj teritorioj en komenco de la deknaŭa jc. estis proksimume nur 8 milionoj da hektaroj.

La *novtempa elano de irigacio* ekiris en la deknaŭa jc. En *Hindio* kaj *Egiptio* konstruiĝis grandaj irigaciinstalaĵoj. Inter aliaj en Hindio en 1854 iĝis preta la *Ganda-kanalo*, en Egiptio la *Delta-digo* (1861), kaj je la jarcentŝanĝo la digo de *Asuan*. Multajn ne grandajn irigaci-sistemojn oni konstruis en okcidenta parto de *Usono*. En Italio oni renovigis irigaci-aranĝaĵojn de Lombardio, inter aliaj konstruiĝis la kanaloj *Cavour*, *Villoresi* kaj *Mariano*. Simile signifa evoluado estas spertebla ankaŭ en *Rusio*. Ekzemple *Aleksandro la Tria* rusa caro en 1887 ekposedis neloĝatan, dezertan teritorion de 115 000 ha en la valo de rivero *Murgav* (Turkestano) kaj tie li establigis irigaciitajn bienojn de modernaj akvo-ekipaĵoj.

Akvoŝveligejo de Kőrösladánu





voŝveligejo de Békés

Fine de la deknaŭa jarcento la amplekso de la irigaciitaj teritorioj atingis 40 milionojn da ha, t.e., dum la daŭro de tiu jarcento tiuj kvinobliĝis. Tio dividiĝis jene: Hindio 17 milionoj, Rusio 4, Usono 3, Egiptio 2,4, Italio 1,6 milionoj da hektaroj. Nuntempe estas irigaciitaj pr. 5,5% de la agrokultura teritorio de la Tero.

Situacio de irigacio en Hungario

La veteron de Hungario influas la seka Mediteranea, la ekvilibrita Okcident-Eŭropa kaj la ekstrema kontinenta klimat-zonoj. Ties rezulto estas ke interne de 10—15 jara ciklo troviĝas ĝenerale unu periodo kun multaj precipitaĵoj kaj unu arida. En la aridaj jaroj montriĝas tre granda manko de akvo, dum la precipitaĵe riĉaj jaroj kaŭzas damaĝojn la tersurfaca akvotavolo kaj la grundakvoj. Tio havas la konsekvencon, ke apud la kontinua leviĝo de la produkta nivelo eĉ hodiaŭ ŝanceliĝas la mezkvantaj produktaĵoj de niaj ĉefaj kulturplantoj.

La disvastiĝo de la irigacio en Hungario reiras ĝis la XVI—XVII-a jarcentoj, kiam estis alklimatigita ĉi tie la kultivado de la rizo. Tamen la proksimume dudek aridaj jaroj inter 1686—1820 ekirigis ankaŭ la irigaciadon de kampoj kaj paŝtejoj.

La pretigo de planoj por pli vastasferaj irigacioj ekiris pro la katastrofa arideco en 1863, kiam ankaŭ la publika opinio postulis irigacion sur la Granda Hungara Ebenaĵo.

Tiuj klopodoj intencis solvi la zorgojn pri akvo por irigaciaj celoj en la orienta parto de la lando trans la rivero *Tiso*, kaj tie ĉefe en la ĉirkaŭaĵo de valo *Körös* kaj *Hortobágy*, ĉar la tie ripetiĝantaj katastrofaj aridoj — kaj krome la konvenaj grund-cirkonstancoj de valo Körös kaj la ĝis tiam jam atingita evoluo de agronomia kulturo — maturigis la situacion por enkonduko de irigacio.

La irigacion kaj disvastiĝon de la rizkultivado sur aridaj regionoj de la Ebenaĵo longtempe malhelpis, ke ĝiaj riveroj havas fluejojn de profunda situo. (Riveroj: Tiso, la tri *Körös, Berettyó, Zagyva, Maros,* ktp.) kaj el ili la akvo, estas elprenebla en granda kvanto sole per multekostaj riverŝveligaj konstruaĵoj digoj, kaj la akvo estas distribuebla nur per granddimensia kanalaro.

La hungara akvojura leĝo el jaro 1885 jam entenis favorajn disponojn por evoluigo de irigacio. Je ties rezulto konstruiĝis novaj irigaciaj instalaĵoj por 15 500 ha, kaj tiel entute 26 100 ha da irigacieblaj regionoj servas pli efike la agrokulturon.

Post la unua mondmilito pro la Trianona packontrakto malpliiĝis la irigaciitaj teritorioj kaj nur post la apero de la „Irigacia leĝo" en 1937 rekomenciĝis la evoluo de irigacio. Denove haltigis tion la dua mondmilito, sed, post ĝi sekve enkonduko de la planekonomio, en pli grandaj mezuroj ekiris la irigaciaj konstruadoj. Laŭ ties irigaciaj sistemoj kaj ĉefe per la abrupta kresko de „monokulturaj" rizplantejoj signife grandiĝis la irigaciaj teritorioj. De tio datiĝas la pli grandproporcia evoluo de irigacio en nia lando.

En tiu evoluperiodo la koncentriĝo de la irigacio translokiĝis sur *„Alföld"*, la granda Ebenaĵo kiu estas malriĉa je pluvoj sed riĉa je sunradio kaj varmo.

La irigacioj laŭ rivero Tiso evoluis ĉefe sur tiuj teritorioj, kie tiuj

Subsurfaca tublokigo de la irigacia fasko de Kisláng



jam havis pasintecon kaj la irigaciaj teknikaj instalaĵoj jam estis pretaj. Tiel unuavice en valoj de la Tri Körös (Blanka-, Nigra-, Rapida-Körös, ĉiuj fontantaj en Transilvanio, Rumanio), krome en la irigaciaj sistemoj en regionoj de *Tiszafüred* kaj *Hódmezővásárhely*. Kiel novajn regionojn ni mencias la teritorion inter *Tiszasüly—Szolnok* sur dekstra bordo de Tiso, krome tiun de *Tiszabő*, kie pluraj *flosantaj pumpilinstalaĵoj* — sur supraĵo de rivero Tiso — servas por elpreni akvon por pli-malpli grandaj irigaciadoj. (*Tiszabő, Tiszasüly, Makkos, Kőtelek, Kisköre*, ktp.)

Komenciĝis la disvastigo de irigacio ankaŭ sur la stepo *Hortobágy* kaj sur la interriverejo Danubo-Tiso. En la akvorezervejo de Tiso estas menciinda la irigacia sistemo en valo de *Hernád*. En la priparolata periodo ne konstruiĝis kontinuaj irigaciaj sistemoj en teritorio de Transdanubio (okcidenta teritorio de Hungario kiun limas la orientdirekta kaj suddirekta etapo de Danubo kaj la rivero Dravo). Tie la irigacio baziĝis sur lokaj eblecoj.

Je konjunkturaj efikoj la irigaciojn en la postliberiĝa unua jardeko karakterizis la granddimensia rizproduktado rapide evoluanta. En tiu periodo la evoluo de irigacia ekonomiko signifis identecon kun la kresko de rizproduktado, resp. de la monokultura rizprodukto. Krom la rizprodukto ekiris la irigacio de aliaj kulturoj (legomo, ĝardeno, kampo, paŝtejo), unuavice tiu de la plantoj de plugkampoj. Tio jam portis kun si la ĝermon de plua evoluo.

Laŭ produktosektoroj estas konstateble, ke la irigacioj de ŝtataj bienoj kaj de produkto-kooperativoj multe kreskis.

Laŭ irigaciaj metodoj tiu periodo estas karakterizebla per la tersupraĵa irigacio. Pro la rizkulturado oni aplikis vaste la kovradon de tersurfaco per akvo. La akvorezervujojn oni provizis per akvo helpe de gravito kaj de grandnombra transleva pumpilo.

Inter la novaj teknikaj irigaciaranĝaĵoj ni emfazas kiel plej karakterizan por tiu jardeko: la duone stabilajn, flosantajn pumpilinstalaĵojn, ĉi tempe aperintajn, dis-



Pumpilinstalaĵo de irigacia fasko ĉe Szabadszállás

vastiĝintajn. Tiuj estas tre konformaj por akvoelpreno el riveroj sennodaj, senŝtupaj, sed havantaj nivelŝanceliĝojn, — unuavice ni mencias nian duan ĉefan riveron: *Tiso*.

En tiu, kaj plua evolua etapo la evoluigon de irigacio — post profundaj preparlaboroj — transprenis la ŝtato, konstruinte la unuajn irigacisistemojn sur kiuj baziĝas ŝtate organizita tutlanda irigaciado.

Granda evento estis tiurilate — ne sole por la Ebenaĵo, sed por tuta Hungario — en 1950 la komenco de konstruo de la unua akvonodo ĉe *Tiszalök*, kaj en 1951 la daŭrigo de la Trans-Tisa irigacia, t.n. *Orienta Ĉefkanalo*. La ekfunkciigo de akvonodo kaj ĝia akvoŝveligejo kune kun la unua etapo de la Orienta Ĉefkanalo okazis somere de 1954. Tio estis elstara stacio de la pli ol centjara klopodo por la granddimensia irigacio de la Ebenaĵo. De tio datiĝas la disflorado de la novaj irigaciaj sistemoj. Tiu irigacisistemo de Tiszalök dum sia pli ol du jardeka funkciado pruvis sian popolekonomian utilecon kaj servas

Akvoellaso de Okcidenta Ĉefkanalo ĉe Tiszavasvár



kiel bona ekzemplo de la instance gvidita irigaciado.

En tiu etapo dum la unuaj jaroj ĝis fino de la kvindekaj jaroj, estis karakteriza por nia irigacio la supereco de monokultura rizproduktado. Ties mezuro poste iom post iom reduktiĝis kun samtempa kresko de la proporcio de plugkampaj kreskaj-irigacioj.

La plej grandkvanta ŝanĝo en la evoluo okazis inter 1960—64. Nome — konforme al la celoj de la dua kvinjarplano — en j. 1960 ekis la pli bone bazita evoluo per la socialisma reorganizo de la agrokulturo. La aridecoj en jaroj 1961 kaj 1962 denove atentigis pri la graveco de irigacio kaj pri certigo de la ankoraŭ mankantaj teknikaj-agrokulturaj kondiĉoj.

La areo de irigacio triobliĝis inter 1960—64, kaj en 1964 ĝi ampleksis 275 000 hektarojn. Kune kun tiu teritoria grandiĝo okazis signifa ŝanĝo en la maniero de akvumado. Parte evoluis la pluvmaniera irigacio, aliparte paralele kun la reduktado de rizkulturado superregis la agrokampa irigacio (50—60% de tuta irigacio).

La pluvmanieraj en 1960 estis 26% de tuta irigacio, sed en 1965 jam la proporcio estis 70%. La teritorio tiel irigaciita en 1964 estis 190 000 ha, do 7,5-oblo de la teritorio irigaciita en 1960. La rapidan disvastiĝon de la pluvmaniera irigacio kaj ĝenerale la granddimensian kreskon de la irigaciitaj teritorioj ebligis la funkciigo de la porteblaj aspergaj irigaciiloj. En 1964 oni uzis pr. 3800 tiajn irigaciilojn de diversaj kapacitoj, tio estis 92% de la pluvmaniera irigacio. La unuajn tiajn instalaĵojn oni importis el eksterlando, sed baldaŭ komenciĝis ilia enlanda fabrikado.

Samtempe oni komencis la estigon de premtubaj pluvmanieraj irigaciiloj kaj sistemoj lokigitaj sub la tersurfaco. Post kelkaj pli malgrandaj instalaĵoj en 1964—65 estis funkciigitaj irigaciaj sistemoj en urbo *Kalocsa* por 4200 hektaroj, en *Balatonaliga* por 2000 ha kaj en Tiszalök por 2300 ha pluvigilo en *Nagyhegyes*. Pro la mezuroj kaj teknikaj solvoj ili okupas eminentan lokon ne sole inter la enlandaj, sed ankaŭ inter la Eŭropaj irigaciiloj.

Kune kun la pluvmaniera irigacio ekiris ankaŭ la utiligo de al subsurfacaj akvoamasoj por irigaciaj celoj per *tub-putoj*. Tiuj jam estas bazoj por irigacio ekster la irigaciosistemoj tie, kie la cirkonstancoj ebligas la akvoelprenon el sub la tersurfaco.

La surfaca irigacia metodo, — kvankam ĝi perdis el sia graveco rilate al la tuta irigacio, teritorie tamen evoluis, kaj en 1964 ĝi estis uzita sur 64 000 ha. Kunlige kun la surfaca irigacio okazis ankaŭ ordigo, nivelado de la tereno.

Proksimume du trionojn de la irigacio funkciigis la produkto-kooperativoj, kaj en 1964 ili superis en tio la ŝtatajn bienojn. La supre pritraktitan periodon karakterizas la granduzina irigacia ekonomikado kaj konforme al tio: kreiĝo de granduzinaj irigaciaj instalaĵoj.

Kvankam la porteblaj pluvmanieraj-irigaciiloj ebligis en vastaj sferoj la utiligon de la lokaj akvoprovizoj, tamen ankaŭ en tiu etapo esence la ŝtataj ĉefinstancoj, — estigitaj por produktado, transportado de la irigaci-akvo, kreas la bazon por la grand-dimensia area evoluigo. La koneksaj laboroj direktiĝis parte al la plua elkonstruado de la jam ekzistantaj sistemoj kaj iliaj modernigoj, — aliparte por estigi novajn sistemojn, aranĝaĵojn. El inter la pli signifaj laboroj estas menciindaj la konstruadoj de *Okcidenta ĉefkanalo*, kaj tiu en *Kiskunság*, la aranĝaĵoj ĉe *Szarvas—Káka* kaj *Malgranda-Rába*, krome la estigo de sistemoj *Tiszabecs—Milota* kaj *Tunyog-Matolcs* kaj multaj plimalpli grandaj akvorezervujoj (ekz. en la irigaci-sistemo de kanalo *Lónyai*). Kune kun la konstruo de tiuj ĉef-instalaĵoj, komence de la sesdekaj jaroj organiziĝis kontrolo de la kvalito kaj kvanto de la irigaci-akvo.

Printempe de 1969 estis ekfunkciigata la laŭvica kreaĵo: *Akvoŝveligejo Békés* en kadro de kanalizo de riveroj *Körös*, en 1973 la plej granda konstruaĵo de la Tiso-valo: la *akvonodo Kisköre*, kiu ebligas irigacion de 300 000 ha tereno. En 1977 okazis la inaŭguro de la *Akvoŝveligejo Körösladány*. En la valoj de la tri riveroj Körös tio estas grava paŝo por krei la kondiĉojn de irigacia ekonomiko. La akvonodo kaj irigaciaj organizaĵoj de Kisköre estas ĉefaj rimedoj por novaj evoluetapoj.

Rezulte de la granda evoluo de Hungaraj irigacio-sistemoj efektivigitaj en la lastaj 25—30 jaroj, la irigaciitaj teritorioj nuntempe ampleksas pr. 485 000 ha. La amplekso de tiaj teritorioj de jaro al jaro forte ŝanceliĝas konekse kun la veterŝanĝoj, sed en plurjara etapo pritaksante kaj la mezan kaj la ekstreman kvanton, ĝi konstante altiĝas. Se ni rigardas la agrokulturan teritoron de tuta Hungario, kiu ampleksas pr. 6,9 milionojn da ha,

Irigacia sistemo per plastmateriala tubo.



Ĝardena irigacio en urbo Szentes





Flosanta akvoelprenilo sur la rivero Blanka Körös (Fehér Körös)

nun ni irigacias 5,5%-n de la kulturita teritorio en sekaj jaroj. Tiu proporcio respondas praktike al la konĉernaj valoroj por la tuta Terglobo.

Esplorante la diversecon de plantoj evidentiĝas ke de jaro al jaro la plej grandan terenon reprezentas tiurilate la plugkampaj kreskaĵoj, nome 50—60% de la tuta irigaciita teritorio.

Nun la reganta irigaci-maniero estas la pluvmaniera irigacio. Tri kvaronojn de la irigaciitaj teritorioj ni provizas per tiu maniero. La alian unu kvaronon preskaŭ ekskluzive prizorgas la tersurfaca irigacio. La subgrunda irigacio estas nur 2% nuntempe, do ne signifa. Estas interese, ke la proporcio inter la irigaciaj manieroj estas sendependa de la jara ŝanceliĝo: proksimume samproporcie ŝanĝiĝas la grandeco de teritorioj diversmaniere akvumitaj. Nur la surfaca irigacio havas lasttempe iometan altiĝon.

En la evoluigo de la irigaciitaj teritorioj, baziĝante sur la evoluo de produkto-fortoj, la utiligo de la naturaj precipitaĵoj postulas ĉiam pli kaj pli, ke la akvobezonoj de la produktataj plantoj direktu la artan akvokvanton. *La biologiajn, materialajn-teknikajn kaj personajn kondiĉojn por la efika utiligo de la arta akvokompletigo estas eble krei nur laŭgrade, komplekse.*

Ĉe formado de la kondiĉoj oni devas priatenti, ke 95% de la tersurfaca natura akvokvanto de la lando venas de aliaj landoj.

La kvalito de la tersurfacaj akvoj havas grandegan signifon ankaŭ en la terkulturado, kaj laŭ la supraj, tio dependas ne sole el la akvopolucioj enlandaj, sed ankaŭ de la polucio de la akvoj venantaj el la najbaraj landoj. La protektado de la akvokvalito do necesigas internacian, koordinitan evoluigon. *La kontrolon de la irigaciakvoj oni devas certigi organizite pro la agrokulturaj interesoj.*

Post evoluigo de la irigacio dum la lastaj jardekoj formiĝis la kondiĉoj de la arta akvokompletigo sur 485 mil ha, — sed je la fino de longperspektiva planperiodo oni devas krei la kondiĉojn de irigacio sur 830 hektaroj priatentante la biologiajn pretendojn de la alterna kulturado de diversaj plantoj sur aridaj terenoj.

Ankaŭ nun estas la *Ebenaĵo* ĉefa tereno de irigaci-evoluigo. En la sekva tempo, antaŭ ĉiuj aliaj interesoj, oni devas koncentri la materialajn rimedojn por pli rapida utiligo *de la akvokvanto certigota per la Dua Akvonodo de Tiso.*

En tiu spaco la utiligo de la akvorezervoj estas realigebla ĉefe per elkonstruado de irigaĉisistemoj kaj irigacifaskoj.

En la celoj de la sekvaj mezperspektivaj planperiodoj, do jam en la VI. Kvinjarplano karakteriza estos la kvanta kaj kvalita plibonigo de la *filamenta furaĝo* (tigo kaj folio) *kaj de amasfuraĝo.* Tial estas *motivita la evoluigo de herbokampoj en pli rapida takto.* Distingita tasko estas disvastigi la akvoaldonon, — okaze de malsufiĉa precipitaĵo, — al tiuj plantoj, kiuj esence estas akvopretendaj, ekz.: diversaj verdaĵoj, legomoj, industriaj plantaĵoj, sukerbeto, sukerkano, terpomo, kaj similaj...

Tr. A. *Pechan*

PANNONIA









PANNONIA Entrepreno pri Ekstera Komerco de UZINOJ CSEPEL

Budapest, VI., Bajza u. 26. 1062
Telegramadreso: PANEXPORT Budapest
Telefono: 228-850. Teletajpilo: 225128 PANEX—H,
Poŝta adreso: Budapest, P. f. 354. H—1394

EKSPORTO:

•

Fajnmetalurgiaj duonfabrikaĵoj por telekomunikada tekniko, elektra kaj elektrona industrioj

•

Inkandeskaj elektrodoj kaj kablokerno por pretigo de elektrodoj de temperature regulita fandofitingo[1]

•

Ŝtaltuboj
Ŝtalboteloj por oksigeno ktp.
Bicikloj por sinjoroj, sinjorinoj kaj infanoj
Biciklo-konsistaĵoj

•

Maŝinoj por la konfekcioindustrio
— Elektraj tajladmaŝinoj
— Kudromaŝinoj
— Gladmaŝinoj
— Gladilaro
Specialaj maŝinoj kaj iliaj subtipoj

•

Maŝinoj por lavejoj kaj por la teksaĵpuriga industrio

•

Kompletaj konfekcio-instalaĵoj por teksaĵ kaj led-konfekcio-industrioj

•

Kompletaj lavejoj kaj vestpurigejoj

•

Transportinstalaĵoj por konfekcio-fabrikoj kaj lavejoj

•

Prilabormaŝinoj por tuboj kaj stangoj
— Pintigmaŝinoj
— Tub-rektigaj, fleksaj maŝinoj
— Longigaŭtomatoj por tuboj kaj stangoj

•

Spiraltub-veldejoj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por produktado de senfugaj tuboj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por ŝtalbotel-fabrikado

•

Maŝinoj kaj uzinoj por pretigo de arklum-veld-elektrodoj

•

Instalaĵoj kaj uzinoj por pretigi biciklo-konstruerojn, kaj por muntadi biciklojn

•

Konigo de Know-how[2] **kaj teknologio, instrukcioj por fakpersonaro**

[1] **fitingo** (PIV): kuniga interorgano (mufo, krano) de tubokondukiloj (por brulgaso, akvo); interĝustiga tubo vaporkondukaj tuboj.

[2] **Know-how:** fabrikad-teknologio, »scii kiel«

Tr. Alfonso *Pechan*

Miroslav Wiechowski

BONA MORTO

— Altestimataj membroj de la Monda Konsilantaro pri Aferoj de Tuthomara Signifo! Kiel la nuna prezidanto de tiu internacia organizo mi havas la honoron malfermi la Kvardek-sesan Plenan Kunvenon. Ĝin ĉeestas reprezentantoj kaj delegitoj de ĉiuj 188 sendependaj landoj kaj aŭtonomaj regionoj de la Monda Komunumo. La nombro de la rajtigitaj reprezentantoj, rekrutiĝintaj el la plej eminentaj sciencistoj, politikistoj kaj sociaj agantoj de la mondo, kaj iliaj statistikaj kvalitoj permesas al mi, surbaze de la kalkuloj de nia Inform-Centro, proklami la Kunvenon jure valida kaj leĝopova. Lige kun tio mi povas prezenti la manieron efektivigi la ordon de la Kunveno, aŭ, pli precize, unu fojon pli memorigi la kutiman riton de la Kunveno, heredita de niaj antaŭuloj. Cetere, ankaŭ tiu prezentado apartenas al tiu rito.

Ĉiu membro de la Monda Konsilantaro ricevas memorkristalon kun antaŭregistritaj projekto de la proponita leĝo, argumentoj por, argumentoj kontraŭ la propono, kaj specimena aro da opinioj pri tiu propono. La opinioj estis eldiritaj de ĉirkaŭ unu miliono da kompetentuloj. Per statistikaj metodoj el ili estis selektita reprezenta aro de 200 diversaj opinioj. Tial ne necesas ripeti tion, kio povas esti facile reproduktita per diversaj aŭdovidaj aŭ senperaj memoriloj, kiujn ĉiu kutime posedas kaj portas en poŝo.

Konforme al la tradicioj ni konservis la formon de malnovstila kunveno aŭ asembleo, kvankam tio neniel estas pravigebla de la nuntempa stato de la telekomunikado. Por ne troŝarĝi tamen la ĉeestantojn per superflua balasto de iamaj kutimoj, la daŭro de individuaj paroloj estas limigita je kvin minutoj.

La fina decido estos fiksita surbaze de la telemezurado de la intenseco de la biopsika kampo „psi". Se la plimulto el vi havos pozitivan sintenon al la proponita leĝo, la kampo „psi" funkciigos la Centran Intelektronon, kiu en dudek mikrosekundoj dissendos la akceptitan de vi decidon al ĉiuj informaj centroj en la mondo. Nun mi donas la parolon al membro n-ro 1614. Dankon.

— La propono de 9022 rajtigitaj personoj kaj supernaciaj organizaĵoj tuŝas la sankciigon de la rajto pri eŭtanazio en formo de tutmonda leĝo. Por ne uzi la plenajn kvin minutojn — kiuj ja por la plimulto el ni estas tempo tro longa — mi resumos: eŭtanazio estus aplikata ĉefe en du kazoj. Unue — oni devas permesi digne morti al homa estaĵo, ofte terure suferanta sen la malplej eta eblo resaniĝi, kaj pro manko de fizika forto nekapabla mortigi sin mem. Malgraŭ la progresoj de biologio kaj medicino, tiuj kazoj ne estas raraj. Sed por eviti miskomprenon, mi klarigas, ke tiu speco de eŭtanazio estus permesita nur post eksplicite kaj plenkonscie esprimita deziro de la paciento. Due — oni devas fari decidon koncerne al kelkdek mil — mi ne hezitas tion diri — kadavroj, kiuj vivas, aŭ ŝajnas vivi, en artefaritaj kondiĉoj, helpe de komplika aparataro. Iliaj cerbo laboras apenaŭ sur la nivelo de malalte evoluintaj bestoj. Iliaj organoj estas nekapablaj memstare teni la korpon viva. Elŝalto de elektrokonektilo egalas al definitiva biologia morto en daŭro de ne pli ol kelkaj minutoj. Dume troviĝas aliaj miloj da homoj, kiuj atendas tiujn aparatojn, kiuj eble povus savi ilian vivon. Tiuj verŝajne mortos, ĉar nia „etiko" malatentas la realon, ĉar nia moralo malpermesas elŝalti bio-animatoron, servantan por ŝajne vivigi kadavron.

Mi mem plene konsentas kun la propono, kvankam mi scias, ke mia opinio ne estas akceptebla por vi ĉiuj. La vorto *euthanasia* en la lingvo de la antikvaj helenoj signifas „bona morto". En la nomo de la vera humanismo, de la vera etiko de la jarcento de intelektronika, biokibernetiko kaj spacveturoj, ni lasu la arkaikajn antaŭjuĝojn. Ni permesu bone morti al tiuj, kiuj tion deziras aŭ dezirus — se ili povus tion esprimi.

— Estimataj kunvenintoj! En la atmosfero de kreskanta aprobo, eĉ entuziasmo por la nova projekto, mia voĉo sonos kvazaŭ malagrabla disonanco. Mia konscienco devigas min tamen eldiri mian opinion — kaj mi petas vin, petas vin plej insiste, refoje pripensu vian sintenon. Mia telepatilo montras, ke vi rilatas nee al tio, kion mi diros — sed malgraŭ ĉio mi eldiros tion.

— Kiel prezidanto, mi atentigas vin teni kiel eble plej strikte la temon.

— ... Eŭtanazio, kiu en la intenco de la leĝoprojektintoj devus esti humanismo, fakte plej certe fariĝos preteksto por krimoj. Imagu, kian teruran precedencon ni faros! Ĝis nun neniu rajtis doni morton al alia homo. Ne gravas, ĉu ĝi estus donita bonintence, ĉu ne. Gravas, ke ni faros la unuan, tial ekstreme danĝeran breĉon en la absolute monolita principo: kuracisto kuracu, ne mortigu. Tra tiu breĉo enfluos maro da kota akvo. Estos malfacile difini, kiam kaj ĉe kiuj kondiĉoj oni rajtas doni „bonan morton". Ni mem kreos grundon por misuzo de tiu leĝo. Kiu scipovos kontroli ĉiujn kuracistojn, ĉiujn flegistojn? Krome — oni neniam povas esti certa ĉu homo, konsiderata nekapabla vivi sen bioanimatoro, ne plu posedas konscion. Laŭ la hipotezo de d-ro Beras manko de la cerba aktiveco observata

sur la ekrano de encefalogramo ne estas definitiva pruvo pri manko de la konscio, nek pruvas la nekapablecon de la paciento reakiri ĝin sub la influo de faktoroj ĝis nun ne bone konataj ...

— Via tempo finiĝis.

— La Centra Intelektrono anoncis, ke post la mezuro de la kampo „psi", oni povas kun probableco 0,997 anonci, ke pli ol 53% de la ĉeestantoj esprimis sin pozitive pri la projekto. Tial ...

— Homoj! Vekiĝu! Vi ne vidas la danĝeron! Eĉ dum la periodo de arta vivtenado iu povas fari malkovron permesantan redoni la vivon al tiuj „kadavroj", kiel esprimis sin iu el miaj antaŭparolintoj ...

— ... Tial la projekto rajtas esti proklamita kiel supernacia leĝo, rekomendita al ĉiuj landoj-membroj de la Monda Komunumo. Kvankam nia Konsilantaro ne posedas plenuman povon kaj nur rekomendas aŭ malrekomendas apliki leĝojn, tamen la tempo montris, ke ĝia morala aŭtoritato estas tiel granda, ke ĝis nun ne estis notita eĉ unu kazo de reĵeto de nia rekomendo. Tutcerte ankaŭ nun okazos same. Ni dankas ĉiujn pro la fruktodona kunlaboro.

— En la nomo de la Supera Tribunalo de la Monda Registaro, la heredinto de la fama Monda Konsilantaro pri Aferoj de Tuthomara Signifo, mi malfermas la Sepdek-kvinan Asembleon. La temo estos: modernigo de la leĝo pri eŭtanazio kaj ĝia adapto al la nuntempaj kondiĉoj. Kvankam okazas misuzoj de la ĝis nun jure valida leĝo, same kiel okazis kaj okazas tragikaj eraroj, ili estas nur la prezo, kiun la homaro devas pagi por la progreso, do ĉi tie ne la leĝo kulpas. La poropono, prezentita laŭ la statutaj reguloj, povas esti resumita jene: oni rajtas apliki eŭtanazion al ĉiu homo, kiu libervole esprimas sian volon ĉesi vivi, sendepende de lia sanstato. Mi konscias, ke troviĝas inter vi homoj, alkutimiĝintaj al malnovaj moroj, al arkaikaj moralaj principoj. Ili bonvolu konsideri la fakton, ke nenies volo povas haltigi la progreson de scienco kaj la evoluon de la moralaj principoj. La historio montras ...

— Rajtigita de la Supera Tribunalo de la Interplaneda Registaro mi malfermas la Cent-dudekan Asembleon. La leĝo pri eŭtanazio bezonas modernigon, kaj mi esprimas la fortan esperon, ke niaj kunsidoj estos sukcesaj kaj iros en atmosfero de interkompreno kaj kunlaboro. La projekto kun du malpli gravaj amendoj povas esti resumita jene: la leĝo pri eŭtanazio estu plivastigita tiel, ke oni povu ĝin apliki ne nur al tiuj personoj, kiuj esprimas sian volon morti eksplicite, sed ankaŭ al tiuj, kies konduto permesas kun 50 procenta probableco supozi, ke ili esprimus tian volon en certaj favoraj kondiĉoj. La eksplicita aŭ supozita emo morti ne bezonas esti eldirita en kondiĉoj de plena konscio.

JULIUS BALBIN

SI VIS PACEM...

Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi volas militon, preparu pacon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi pacas volon, militu preparon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi pacas preparon, militu volon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi militas preparon, pacu volon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi preparas volon, pacu militon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi preparas volon, pacu militon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi militas volon, pacu preparon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi volas preparon, militu pacon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi preparas militon, volu pacon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi preparas pacon, volu militon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi militas pacon, preparu volon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi pacas militon, volu preparon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi militas militon, pacu pacon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi pacas pacon, militu militon.
Se vi volas pacon, preparu militon.
Se vi volas pacon, preparu pacon.

1975

Gloso: Si vis pacem para bellum — (latine) „Se vi volas pacon, preparu militon" La militpolitika devizo de antikvaj romianoj.

Unu el la amendoj antaŭvidas la eblon permesi apliki eŭtanazion far ĉiu maturaĝa persono, kiu en — eĉ subjektiva — bona volo trovos alian personon nesufiĉe energia aŭ melankolia, trista ktp., kiuj ecoj permesas supozi, ke tiu persono post persvado konsentus morti. La eksplicita konsento evidente ne estos bezonata. Sendube, multaj kunvenintoj, kiuj etike ankoraŭ troviĝas en la Mezaj Jarcentoj, trovos tiun projekton eble tro aŭdaca, tamen, se ili bonvolos konsideri ...

— La Ducent-tria Asembleo ĉi-sube fiksas la jenan, longe atenditan leĝon: ĉiu rajtas mortigi iun ajn, se li havas por tio motivojn. Klarigo de tiuj motivoj ne estas necesa, por ne troŝarĝi niajn Buro-Centrojn per superflua laboro ...

Vladas Ruževičius

Loko por Esperanto inter naciaj lingvoj

Al la memoro de profesoro D. L. Armand

Iuj opinias, ke en grandaj landoj la problemo pri internacia lingvo aŭ entute ne ekzistas, aŭ se ĝi ekzistas, ĝia signifo praktike ne estas grava. Grandaj landoj ofte estas multnaciaj ŝtatoj, kiu fakto tamen lanĉas la lingvan problemon. En Sovetio tiu ĉi problemo sufiĉe sukcese solviĝis per dulingvismo karakteriza por multnacia ŝtato. Laŭ M. I. *Isajev* en Sovetio la plej grava formo de la dulingvismo konsistas en tio, ke ĉiuj popoloj en sia nacia komunumo uzas la nacian lingvon, kaj por kontaktoj kun alilingvaj sovetianoj ili utiligas la rusan.[1] Do, la rolon de internacia idiomo en Sovetio fakte ludas la rusa lingvo.

Por pli bone interkompreniĝi en tutmonda skalo, kiel tio jam okazas en Sovetio, ankaŭ eksterlande oni lernas la tutmonde plej disvastiĝintajn naciajn lingvojn.

En tia situacio povas ŝajni, ke por la internacia lingvo Esperanto efektive jam mankas loko. Aperas grava principa demando: ĉu ni, esperantistoj, havas ian ajn bazon, proponante plej vaste studi kaj uzi la internacian lingvon Esperanto? Se jes, do kian lingvan pozicion aŭ politikon ni devas sekvi? Aŭ eble, male, ni simple vane perdas la tempon? Por respondi al tiuj ĉi demandoj ni analizu la situacion pri la instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj.

En Sovetio oni dediĉas speciale grandan atenton al la fremdaj lingvoj en *mezlernejoj*. Ne malpli ankaŭ en la *superaj*. Fremdaj lingvoj eniras ankaŭ la minimuman programon por akiri sciencajn gradojn. Sed kia do estas la rezulto de tiu kolosa laboro? — Plej ofte kompatinde mizera. Estas superflue klarigi la kaŭzojn. Temas ĉefe pri du kialoj: la malfacileco de la studataj lingvoj kaj nesufiĉo de la tempo, dediĉata por ili en la lernejoj.

Pro nesufiĉa ellerno de fremdaj lingvoj, mankas taŭga aplikeblo por ili, kaj pro tio la lernitaj fremdaj lingvoj post nelonga tempo forgesiĝas. Tial konsiderindan parton de tempo, energio kaj monrimedoj, dediĉatan por lernado de fremdaj lingvoj, oni foruzas sen ajna utilo. Tio fariĝas kolosa malprofito. En Sovetio tiu sumo, alportanta nenian utilon, estas jare *minimume 450 milionoj da rubloj.*[2] Por tiu ĉi sumo oni povus veturigi senpage al laboro per urbaj aŭtobusoj dum plena kvaronjaro ĉiujn laborulojn de nia vasta lando.

Do, ne estas mirige, ke pri la neceso scipovi fremdajn lingvojn, pri ilia instruado, tiom multe oni skribas, parolas, diskutas.

En diskutoj pri la instruado kaj lernado de lingvoj, inter tre diversaj ideoj kunfrontiĝas du ĉefaj rekte kontraŭaj opinioj. Ekz. en unu el la artikoloj, aperintaj sur la paĝoj de *Literaturnaja Gazeta*, titolita *Pleje gravas la viva vorto!* I. *Gorelov*[3] defendas la necesecon kaj efikecon de la rekta metodo, ekz. de la *sugestopedio* de G. *Lozanov*. Li opinias, ke oni devas studi la vivan, parolan lingvon, kaj neniel aliri ĝin kiel logikan konstruaĵon, studante nur gramatikajn regulojn kaj farante tradukojn. Ja nur la kapablo libere paroli iun fremdan lingvon atestas pri ĝia plena kaj definitiva scipovo. La rekta metodo estas vaste kaj sukcese aplikata en la tuta mondo, ĉar nur ĝi ebligas plene ellerni kaj scipovi lingvon.

En alia artikolo, aperinta en la sama numero de *Literaturnaja Gazeta*, titolita *Ne paroli, sed traduki!*, A. *Pumpjanskij*[4], kvazaŭ intence kontraŭstarante la koncepton de I. *Gorelov*, asertas, ke, unuflanke, studado de viva, parola lingvo ne estas laŭcela, ĉar por la absoluta plimulto de la homoj la eblo de buŝa aplikado tute malestas aŭ estas tre limigita. Kaj, aliflanke, lingvo mem dispartiĝis je apartaj stiloj: scienca, politika, ĉiutaga ktp. Tial studado de lingvo en ĝia tuta amplekso estas vana perdado de tempo. Lia finkonkludo estas la jena: specialisto, por kiu fremda lingvo ne estas pli ol laborinstrumento, devas ekposedi la gramatikajn formojn de bezonata de li lingva stilo, kaj akiri praktikon en adekvata tradukado al sia gepatra lingvo.

Nuntempe en Sovetio la mezaj kaj superaj lernejoj dediĉas al la instruado de fremda lingvo proksimume 1100 lernohorojn. Tio proksimume egalas al kurso de unujara tempodaŭro. Post supera lernejo, fininte tian kurson, oni apenaŭ povas helpe de vortaro kompreni literaturon de sia specialeco. Oni opinias, ke en la nuntempaj kondiĉoj por bone ellerni fremdan lingvon, oni bezonas proksimume kvin jarojn. Sekve, la nuntempaj Sovetiaj mezaj kaj superaj lernejoj dediĉas por tiu ĉi celo nur *kvinonon* de la necesa instrutempo. Nun, kaj malpli en la estonto, estas nereale pensi, ke eĉ duono de la necesa tempo povos esti dediĉata al la instruado de fremdaj lingvoj. Tial oni ne povas ne konsenti kun A. *Pumpjanskij*, opinianta, ke por akiri la plej efikan rezulton ĉe tiom limigita

instrutempo, oni devas turni sin en la lernado de fremdaj lingvoj al celo multe pli mallarĝa, t. e. instrui specialistojn almenaŭ bone traduki.

Tamen lingvo ne estas nur labora instrumento. Ĝi ja, laŭ konata difino de V. I. *Lenin* „estas la plej grava rimedo de homa interkomunikado"[5]. Pro tio lingvo, kiun homoj ellernis ĝis la grado de scipovo nur traduki specialajn tekstojn (kompreneble ne sen helpo de vortaro) ne povas ludi sian ĉefan rolon, ne povas servi kiel la ĉefa, kiel la plej grava rimedo de homa interkomunikado. Ĝuste pro tio ni ne povas ne konsenti ankaŭ kun la aŭtoro de la unua artikolo: *Pleje gravas viva vorto!* Tamen, por ke nuntempa lernejo povu instrui homojn ne nur bone traduki, sed ankaŭ flue paroli fremdajn lingvojn, estas necese pligrandigi kvinoble la tempon nun dediĉitan por la instruado de fremdaj lingvoj.

Tiamaniere la partianoj de la rekta, kaj eĉ pli tiuj de la gramatika metodo konfesas, ke ĉe la nuntempaj kondiĉoj plena ellerno de fremda lingvo en Sovetio ne povas esti atingita. Ŝajnas do, ke oni trafis la magian cirklon. Iuj tamen multe esperas pri la modernaj rapidigaj metodoj de lingvoinstruado, kaj ĝuste en tiuj vidas la veran solvon de la problemo[6]. Tamen, kiel ajn efikaj estu la intensaj metodoj de lingvoinstruado, ili ne estas kaj ne povas esti la vera solvo de la problemo. Ja neniu povas kontesti, ke por apliki tiajn metodojn, oni bezonas multekostajn kaj tre deficitajn teknikajn rimedojn, altajn metodikajn sciojn de instruisto kaj lian egan fizikan kaj intelektan ŝarĝadon: laŭ la ĉefulo de klerigo, G. *Trajnin* „... unu monato por instruado, kaj du monatoj da preparigo por ĝi".[6]

Por kurso de fremda lingvo oni starigu la ĉefan celon akiri kiel eble plej bonan kapablon de speciala tradukado. Kaj la pli vasta celo de adaptiĝo al parola lingvo estu atingita per instruado kaj lernado de la lingvo Esperanto. Tio estos utila kaj por la specialisto, kaj por la turisto eksterlande, kaj ankaŭ por partoprenantoj de internaciaj kongresoj, konferencoj, simpozioj ktp. Jen, al kio devus turni sian atenton ĉiuj, kiujn maltrankviligas la supre tuŝitaj kaj analizitaj problemoj, kaj jen, laŭ mia opinio, al kio devas strebi ni, esperantistoj.

Pro la facileco kaj logikeco de la lingvo Esperanto, liberan scipovon de ĝia parola formo oni povas atingi foruzante por tio probable malpli ol dekonon de la tempo kaj monrimedoj, dediĉataj nuntempe al la sama celo ĉe lernado de kiu ajn fremda lingvo. Konsiderante ankaŭ la fakton, ke lernado kaj scipovo de Esperanto ne nur ne malhelpas, sed male, eĉ helpas la lernadon de aliaj lingvoj[7], la tuta perdo por studado de lingvoj estos eĉ pli malgranda. Sekve, la malprofiton oni ne povas konsideri kiel iom gravan malhelpon kontraŭ la enkonduko de Esperanto kiel *deviga* lernobjekto en ĉiuj lernejoj.

El tio, kio estis dirite supre, oni ne konkludu, ke Esperanto ne taŭgas por transdono de scienc-teknikaj materialoj. Tamen, por ĝia vasta aplikado en la sfero de scienco estus necese reorganizi la referadocentrojn kaj informadofakojn, eldonejojn, instrui Esperanton al jam maturaj specialistoj — unuvorte, tio postulus seriozan reformon de la disvastigo de scienc-teknikaj konoj. Kvankam en la epoko de la scienc-teknika revolucio tia reorganizo povas doni netakseblan utilon, tamen ĝis ties efektivigo probable pasos pli multe da tempo kun la neceso venki pli grandajn barojn, ol ĝis la enkonduko de Esperanto en nialandajn mezajn kaj superajn lernejojn.[8]

Tiu ci jubilea antologio de Belartaj Konkursoj enhavas pli ol 50 verkojn de aro de autoroj el preskau 30 landoj: la plej sukcesajn premiitajn verkojn de la lastaj 25 jaroj. Ne maltrafu la eblon havi fidindan bildon pri tiu periodo de la esperanta literaturo!

18 cm., 208 p. Prezo: 13,80 ned. gld. Mendu ce UEA au rekte ce Hungara Esperanto-Asocio!

La popularan romantikan romanon de Mór Jókai nepre eksatos ciuj esperantistaj legantoj pere de tiu ci bildrakonto, kiu estis farita lau la klasika, plurfoje filmita verko. Preskau 400 desegnajoj kaj facile kompreneblaj komentarioj vin helpas kanatigi kun la aventuroj de la herooj. Aparte menciindas la placa eksterajo de la libro: la kovrilon ornamas kolorfoto.

24 cm., 64 p. Prezo: 6,— ned. gld. Mendu ce UEA au rekte ce Hungara Esperanto-Asocio.

FONTOJ KAJ NOTOJ

1. *Isajev* M. I. Pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko. „Der Esperantist", 1975, N-ro 71, p. 13.
2. *Armand* D. L. Naučno-tehničeskaja informacia i problemy mnogojazyčija. Moskva, 1964. (En rusa lingvo).
3. *Gorelov* I. Glavnoje — živoje slovo. „Literaturnaja gazeta", 1975, N-ro 4, p. 11. (En rusa lingvo).
4. *Pumpjanskij* A. L. Ne govoritj, a perevoditj! „Literaturnaja gazeta", 1975, N-ro 4, p. 11. (En rusa lingvo).
5. *Lenin* V. I. Polnoje sobranije sočinenij, izd. 5, volumo 25, p. 258.
6. Čto meŝajet statj poliglotom. „Literaturnaja gazeta", 1975, N-ro 52, p. 12—13. (En rusa lingvo).
7. *Zlatnar* P. La internacia lingvo por internacia eduko. „Esperanto", 1975, N-ro 7—8, p. 25—26.
8. La vortoj de la lasta alineo apartenas al la ŝatata profesoro D. L. Armand. Ili aperis en rus-lingva tajpita artikolo, preparita de li laŭ mia esperantlingva materialo, kiun mi sendis al la profesoro por lia prijuĝo. La artikolo certe estas unu el la plej lastaj laboroj de la profesoro. Ĝi samtempe estas dokumento, atestanta pri lia senhalta laboro por internacia lingvo ĝis la lasta spiro.

D-ro Carl Stöp-Bowitz

VALORAJ SCIENCAJ ELDONAĴOJ

Sciencaj Komunikaĵoj. Aldono al Budapeŝta Informilo. Eldonas: La Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio. Prezo: 14,-gld.

Sciencaj publikigaĵoj en Esperanto bedaŭrinde ne abundas. Tio estas efektive nelogika, ĉar scienco laŭ sia naturo estas esence internacia. Unu grava obstaklo evidente estas ke la plej multaj sciencaj revuoj akceptas artikolojn nur en difinitaj lingvoj, kaj Esperanto ordinare ne estas inter ili. Sciencaj periodaĵoj publikigitaj principe en Esperanto preskaŭ ne ekzistas. Oni jes de tempo al tempo starigis tiajn periodaĵojn sed ili preskaŭ ĉiuj havis malongan vivon. Escepto estas nur *Scienca Revuo* de I. S. A. E., kaj oni povus mencii ankaŭ la popularsciencan *Homo kaj Kosmo.*

Des pli ĝojiga kaj salutinda estas la apero de la nova periodaĵo, Sciencaj Komunikaĵoj, kiel aldono al Budapeŝta Informilo. Evidente la klubo Konkordo en Budapeŝto estas unu el la plej grandaj kaj kulture plej fortaj en la mondo. Kiel oni povas legi en S. K. por 1976 la grupo ekde 1972 i. a. regule aranĝas sciencajn vesperojn ĉiun duan semajnon (mi scivolas ĉu ekzistas alia Esperanto-klubo, kiu povas fari ion similan!), kaj la bazo, almenaŭ por la unuaj kajeroj de S. K., estas prelegoj prezentitaj enkadre de tiuj vesperoj. Sed ŝajnas, ke oni akceptos ankaŭ aliajn manuskriptojn. Aperas po unu kajero jare (en Julio), sed la amplekso kreskis de 48 paĝoj en 1975 ĝis 100 paĝoj en 1977*, kio bele atestas pri la aktuala bezono de tiu periodaĵo.

La menciita origino de la kontribuaĵoj kompreneble garantias altan nivelon kaj grandan varion. En la unuaj tri kajeroj, kiujn mi vidis, troviĝas artikoloj pri ekz. medicino, natursciencoj, farmacio, informadiko, teĥniko, arheologio, Esperantologio, juro, k. t. p., do evidente io por ĉies gusto. Redaktoro estas D.ro inĝ. *Ottó Haszpra* D. Sc. Mi kompreneble ne estas kompetenta por aparte recenzi ĉiun kontribuaĵon. Por tio certe ankaŭ recenza rubriko ne povus disponigi spacon. Sekve mi koncentriĝis pri la artikoloj biologiaj aŭ parencaj al biologio kaj pri la Esperantologiaj.

Estas nature kaj ankaŭ aplaŭdinde, ke kelkaj kontribuaĵoj estas t. n. alt-sciencaj aliaj pli-malpi popularsciencaj. Tiuj lastaj ja estas legeblaj kun profito ankaŭ de ali-fakuloj, kiuj tiel havas okazon plivastigi sian horizonton rilate temojn, pri kiuj ili ne ĉiutage okupiĝas, kaj ankaŭ de nefakuloj kun similaj deziroj. Kelkaj el la artikoloj estas provizitaj per resumo, plej ofte anglalingva okaze ruslingva. Mi salutus, se okaze oni resumus ankaŭ german- aŭ franclingve. Kaj kial ne aldoni resumon ankaŭ en la lingvo mem de la revuo, do en Esperanto? Ofte oni ja unue legas resumon por konstati, ĉu la artikolo mem tiom interesas, ke oni legu ĝin (almenaŭ kiam temas pri alt-sciencaj artikoloj), kaj ne ĉiu leganto de S. K. scias ĉiujn eĉ ĉefajn naciajn lingvojn.

Inter la enhavo troviĝas ankaŭ recenzoj pri aliaj publikigaĵoj prisciencaj. Ĝenerale oni devas supozi, ke tiaj publikigaĵoj trovas pli kompetentajn recenzojn en tia publikigaĵo, ol en ordinaraj Esperanto-revuoj.

Tre grava flanko de ĉia prisciencа verkado en Esperanto estas la kreado kaj uzado de terminologio. La esperantistaro prave fieras pri la multaj terminologioj ellaboritaj kaj -ataj, sed tiuj restas nur sterilaj, se neniu uzas la proponitajn terminojn. Aliflanke oni ne ĉiam povas esti certa, ke termino kreita sen kunteksto montriĝos taŭga en la praktiko. Ĉi tio estas temo, kiu bezonus seriozan pristudadon. Verkante tekston en Esperanto, pri temo, kiu ne disponas pri ellaborita terminaro, oni estas devigata mem proponi la necesajn fakajn terminojn, oni devas eksperimenti. Posta uzado montros kiuj el tiaj eksperimentaj formoj estas bonaj, kaj kiuj ne; kaj verkantoj de terminaroj povos ĉerpi el formoj jam proponitaj, ili ne devas ĉiujn formojn mem proponi. En pluraj el la artikoloj mi konstatas ĝuste tian eksperimentadon pri terminoj, tre utilan.

Inter la esperantologiaĵoj troviĝas longa artikolo de *Kalocsay* pri la vortosistemo de Esperanto. Aliflanke troviĝos ankaŭ artikolo de *Szerdahelyi:* „Skizo pri morfemiko de Esperanto". El ili Kalocsay ja apartenas al la tradicia skolo de Plena Gramatiko, dum Szerdahelyi estas profesia lingvisto, universitata lekciisto pri Esperanto, kiu kuraĝas havi kaj esprimi proprajn opiniojn pri iu kaj alia flanko de Esperanta lingvistiko. Estas tre laŭdinde, efektive bezonate, ke aperu novaj pensoj, novaj ideoj, same kiel okazas en ĉiuj aliaj lingvoj, kaj ja en ĉiuj sciencoj. Tio atestas nur pri la vivanteco de Esperanto kaj kontribuas por malhelpi, ke la Esperantolingvistiko rigidiĝu.

Fine kelkajn vortojn pri teknikaj detaloj. La kajeroj La lingvaĵo ŝajnas grandparte modela, almenaŭ en la artikoloj, kiujn mi legis. Kompreneble oni povus kritiki iun aŭ alian terminon proponitan aŭ iun aŭ alian esprimon, sed tio estus detaletoj, la ĝenerala impreso estas tre bona.

estas produktitaj per fotita tajposkripto, tre klara. Nur la kuriozaj, modernegaj literoj de la titolo de la periodaĵo estas malfacile legeblaj. Ilustraĵoj estas sufiĉe abundaj, kaj tiuj, kiuj konsistas el desegnaĵoj, kaj eĉ kelkaj fotografaĵoj, estas kontentigaj, sed ĝenerale fotografaĵoj ne tre bone sukcesas per la uzata prestekniko. Al la tekstoj oni klopodas doni rektan dekstran marĝenon, kio al mi tre plaĉas. Sed oni atingas (preskaŭ!) tiun celon per iom kurioza sistemo plenigi vakuon ĉe fino de linio per = aŭ per x, kaj malhelpi trolongecon de linio per submetita ligstreketo, anstataŭ per ekstraj interspacoj inter vortoj, aŭ per ellaso de interspaco, ekz. post interpunkcia signo. Estas interesa eksperimento, certe laborŝpara.

Mia plej grava kritiko temas pri la titoloj de la artikoloj, kiuj estas simple maŝinskribitaj, majuskle, jes, kaj substrekitaj, sed ili ne estas pli grandliteraj, ol la cetera teksto, kaj tiel ili ne sufiĉe elstaras, oni apenaŭ rimarkas, trafoliumante kajeron, kie komenciĝas nova artikolo. Mi rekomendas al la eldonantoj studi la titolteknikon uzatan en aliaj tajposkripte produktataj revuoj, ekz. *La Skolta Mondo.*

Konkludo: Gratulon al la Budapeŝta Teritoria Komitato, prosperon al Sciencaj Komunikaĵoj! Sed fine unu demando: Bonvolu indiki ĉu, kaj eventuale kiel, nericevanto de Budapeŝta Informilo povas aboni aŭ ricevi ĝian sciencan aldonon, kiu certe meritas tutmondan disvastiĝon. (Oni mendu ĝin ĉe la Libroservo de UEA aŭ ĉe Hungara Esperanto-Asocio. En socialismaj landoj oni turnu sin al sia landa asocio. — *Noto de la Redakcio.)*

* Intertempe aperis **Sciencaj Komunikajoj 1978,** kiu ankau ampleksas 100 pagojn. Gi enhavas pli ol 20 studojn el la kampo de tre diversaj sciencoj, kun enkonduka artikolo de la redaktoro d-ro Ottó **Haszpra,** kiu skizas siajn seprtojn pri la scienca aplikado de Esperanto, lancante interesajn proponojn. Tiu ci kajero ankau estas mendebla, cu ce la Libroservo de UEA, cu rekte ce Hungara Esperanto-Asocio. **(Noto de la Redakcio.)**

JUBILEA ANTOLOGIO

25 jaroj. Antologio de Belartaj Konkursoj 1951—1975. Redaktis William Auld kaj Vilmos Benczik. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1977. 18 cm., 208 p. Prezo: 13,80 ned. gld.

En la enkonduko al la nova libro „25 jaroj" aŭ „Antologio de Belartaj Konkursoj" d-ro Humphery Tonkin — prezidanto de UEA — sprite karakterizas la Belartajn Konkursojn kiel „nutrejo" kaj „prezentejo" de Esperanto-talentoj. La Belartaj Konkursoj donis ne nur novajn talentojn, sed akrigis la intereson al la originala Esperanto-literaturo, kaj nun per tiu ĉi antologio ni havas la eblon pli detale observi ĝian evoluon dum tiuj ĉi 25 jaroj.

Tiu bele presita kaj tipografiita libro (kovrilo kaj tipografio: Éva Farkas-Tatár) konsistas el tri partoj: „Originala poezio", „Tradukita poezio" kaj „Originala prozo". William Auld, la redaktoro de la poezio, per la elekto de la premiitaj poemoj strebis doni vastan bildon de Esperanto-poezio kaj tiamaniere elokvente, nature pruvi ĝiajn valoron kaj altan nivelon.

Bunta estas la gamo de la problemoj, ideoj, temoj kaj bildoj, talente esprimitaj en la diversaj poemoj. Ne eblas en unu recenzo trarigardi eĉ pli grandan parton de la elektitaj poemoj, sed mi pli detale analizos la artan poetikan esprimon de unu el la eternaj problemoj de vivo — la amo — en diversaj versaĵoj.

Por Marjorie Boulton („Alvoko al Amo") la amo estas ĉio: „vivkomenco", „vivosumo". Anhele, en fluaj strofoj la poetino benas tiun homan senton, tiun „veran iluzion". Por Sándor Császár („Majnokta serenado") la amo estas tenera melodio. Se Boulton pasie vokas nur la senton — Amon — en la poemo de Császár la amo havas konkretan figuron — Alic', sed „Majnokta serenado" sonas iomete deklarative, ĉar la poetikaj komparoj kaj bildoj estas el arsenalo de la simbolismo: „perloj sur la firmamento", „tremanta Luno"...

Eli Urbanová („Tuko") esprimas la amon per konkreta reala objekto — unu tuko — kaj en ŝia poemo la emocio estas pli forta, pli profunda, pli tera. En „La pordo fermiĝas" Violin Oljanov malkovras alian flankon de la sento — malapero de la amo. Per trafaj metaforoj la poeto amare konstatas, ke la amo povas esti ne nur najtingalaj triloj, sed „Venena sento". En „Anna" Auld tuŝas la erotikon de la amo, majstre esprimitan per realaj, ĉiutagaj, eĉ nepoetikaj objektoj.

Tiu ĉi skiza komparo elokvente montras la riĉecon de la lingvo, taŭga esprimi la plej delikatajn sentojn kaj pensojn.

Multaj aliaj poemoj ravas la legantojn, sed ne mankas ankaŭ malsukcesaj, fakto komprenebla, ĉar ne en ĉiuj jaroj la prezentitaj poemoj estis egale altnivelaj.

La redaktoro de la prozo Vilmos Benczik veršajne havis pli multajn problemojn dum la elektado ol sia kolego Auld, ĉar ne nur mi konstatas, ke la originala Esperanto-prozo estas en pli malbona stato ol la originala Esperanto-poezio. Kelkaj el la rakontoj en la antologio estas nur prozaj skizoj, en kiuj mankas interesa temo, ideo kaj la figuroj restas nur palaj ombroj („Fraŭlina pudoro similas al oro", „Uniformo" k.a.). La rakontoj kiel „La kaptito" de Miyamoto masao kaj „Neĝhomo" de Tibor Sekelj aŭ „Morto de la poeto" de Andreo Szabó k. a. atestas pri la talento de iliaj aŭtoroj. Ekzemple Miyamoto masao reale priskribas la naturon kaj en lia stilmoderna rakonto eĉ la ordinaraj objektoj ekvivas. Sekelj kaj Szabó posedas riĉan fantazion emocian, tre necesan por ĉiu verkisto, iliaj rakontoj estas veraj perloj de nia originala literaturo.

La interesaj grafikaĵoj, verkoj de Gerő Bottos, riĉigas la enhavon de la libro.

Se mi devus doni koncizan difinon de „Antologio de Belartaj Konkursoj" mi nomus ĝin bunta bukedo en kiu ĉiu leganto trovos siajn plej ŝatatajn florojn.

Georgi *Mihalkov*

LUKSA BILDRAKONTO

Mór Jókai: La filoj de l'ŝtonkora homo. Bildrakonto, E-teksto de V. Benczik. Eld.: HEA, 17x24 cm, 64 p. prezo: 18,— Ft. 6,— Gld.

Unu el la plej popularaj romanoj de la granda romantika verkisto fine alvenis — almenaŭ en formo de bildrakonto — al la esperantistoj. Kvankam certe multaj jam legis tiun amo- kaj aventurplenan historian romanon pere de tradukoj al almenaŭ 9 lingvoj, aŭ ekscitiĝis rigardante sur kino-ekrano ties heroajn kaj malheroajn figurojn, ĉiuj povas ree plezuri, sekvante la komplikajn fadenojn de la romano nun sur la bildserioj. Oni devas rapide kaj trankviligante aldoni, ke la desegnoj de Pál *Korcsmáros*, dank' al la konvene grandaj mezuroj, sufiĉe detale, kun majstra elokventeco prezentas ne nur okazintaĵojn kaj kostumojn plej diversajn, sed ankaŭ karakterojn, emociojn kiel tre maloftas en tiu ĉi ĝenro. Eĉ kiu emas preteriri bildrakontojn— foje certe prave — apenaŭ povas demeti ĉi tiun libron, se jam sur la unuaj paĝoj *aperas* antaŭ liaj okuloj bilde kaj koncize, animkaptaj komplikaĵoj kaj — kavalireskaj aventuroj.

La profunda humoro de Jókai memkompreneble prezentis agrablan terenon por la bildrakonton verkintoj, kaj ili ne hezitis abunde utiligi kaj la komikajn aventurojn, kaj la priŝercindajn ulojn, kiuj ofte trovas sin, je agrabla surprizo de la leganto, en ege ridindaj situacioj. La grandromantikaj scenoj, mirinde pentritaj pervorte de Jókai, ŝajnas plej konvenaj por la talento de la verkintoj; ties avantaĝon povas multfoje ĝui la leganto. Mi aludas je la riskega veturo en la rusa vintro, je la persekutado de Ödön, sed mi ne forgesu tiurilate ankaŭ la barikadojn en Vieno de 1848.

La brila stilo de la fama verkisto prezentis grandiozan taskon por la redaktanto *Cs. Horváth*, kaj kompreneble neniom malpli al la tradukanto. Miaopinie la koncizigo de la originala, abunde flua teksto plejparte sukcesis, ofte eĉ vere lerta ĝi estas konsiderebla. Facile kaj rapide kompreneble venas la frazoj aŭ frazeroj en nia lingvo; la nefacilan interpretadon de la historiaj, multfoje hungarecaj diraĵoj solvis la tradukinto tiel, ke eĉ komencantoj povas legi la tuton plezure, sen ajna komento, sen piednotoj. Eklegi kaj finlegi tiun libreton signifas la saman, — ne nur kredas tion, sed mem spertis tiel la recenzanto.

Ervin *Fenyvesi*

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

240 lit. ***
ultrafridujo 20-litra, -18 C°

Fridiga nutraĵkamero de la familio



Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR Jászberény

DE LIBRO AL LIBRO

La libroeldono de Hungara Esperanto-Asocio dum la lastaj jaroj revigliĝis. La libroj regule kaj grandnombre aperadas. Nun ni kaŝis kelkajn titolojn. Ensendi sufiĉas: h1, h 20, h 68. kaj v 1, v 2, v 29, v 44. Inter la solvintoj ni lotumos el ĉi tiuj libroj. (Adreso: HEA, H—1368, Pf. 193.)

Horizontale: 1. *Grandsukcesa romano de Mór Jókai — HEA aperigis ĝin en formo de bildrakonto kaj en rekorda nombro de dek mil ekzempleroj.* 13. Regule venanta plenumi sian taskon 14. Provinco konsistiganta limparton de imperio 15. Simbolo de fekundeco ĉe Hinduoj 18. Pompa pendlampo (R) 19. Faceto de kunmetita okulo de insektoj (R) 20. *Okcidentanoj povas mendi niajn librojn ĉe la Libro... de UEA* 22. Esprimanta surprizon 23. Mallongigo de aranĝo de Interlingvistika Studentrondo de la Varsovia Universitato 24. La rivero de Florenco 25. Roso! 27. Simboloj de germanaj, italaj kaj hungaraj aŭtomobiloj 28. La 24a litero de E-o alfabeto 29. Junulara Komisiono 30. Apartigi substancojn tra membrano (R) 33. Interjekcio en telefono 34. Malfreŝe 36. Punkciilo por ellasi el la vundo likvaĵon (R) 38. Malprogresi 40. Forlaso de kelkaj silaboj ĉe la vortofino 41. Kunpremo de organo (R) 43. Faldostomako (R) 45. Ol 47. Gajema (R) 49. Flava metalo (R) (50. Radiko de la nomo de la unua virino 51. NNK 53. Sulfuro kaj oksigeno 54. Maldika (R) 56. Fosforo kaj natrio 57. New ... Amerika urbego 59. Gaso 60. Ĝi ĉirkaŭas la bildon (R) 61. Gajni 63. Tenejo 64. Manĝebla fiŝo 65. Paro de virlupo 67. Piedvarmigilo (R) 68. *Satira verko de Lejzerowicz reeldonita de HEA*

Vertikale: 1. *La verkisto de libro „De paĝo al paĝo"* 2. *Esperantistoj en socialismaj landoj abonu niajn librojn ĉe sia Landa...* 3. Esprimo de kartludo (R) 4. Reen: antikva regno en Malgranda Azio (R) 5. Prunto 6. La unua vorto de la bebo 8. Literatura Mondo 9. Vintra vestaĵo (R) 10. Centra pilastro (R) 11. Kombinaĵo de oksigeno (R) 12. Organika ciankombinaĵo (R) 16. Grava parto de magnetofono (R) 17. Kovo! 20. SR 21. Malsupra ferdeko de ŝipo 24. Plirapidigos 26. Ligno uzata por ĉerkoj en antikva Egiptio (R) 29. *25...* — *La titolo de kolektitaj literaturaĵoj premiitaj.* 31. Multnombra 32. Malofta virnomo (ZAKAR) 34. Malplena



logiko! 35. Filon de Isaak 37. Matena akvoguto sur la folioj (R) 39. IPI 42. Ano de finna gento (R) 44. *HEA reeldonis ankaŭ ĉi tiun gravan verkon de Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti* 46. Grefti — arkaismo (R) 48. Haro de ŝafoj 50. Malsano (R) 52. Al li mankas iu membro (R) 55. Ludo en antikva Ĉinio (R) 56. Blankvizaĝa (-o) 58. Laŭtega 60. Ujo ekz. por fruktoj (R) 61. Vojo inter du vicoj de arboj (R) 62. Vin — miksite 64. Svedaj. Tajlandaj kaj italaj aŭtoj 66. Orient-Eŭropo (mll.) 67. ŜB.

La ĝusta solvo de nia krucenigmo aperinta en la 2-a numero de Hungara Vivo estas: „Bona kaporalo revas esti generalo."

Libropremion gajnis: Atanas GAEV (Bulgario), Stanislaw JANUSIEWICZ (Pollando) kaj KIS Ilona (Hungario).

La premiojn ni jam sendis per poŝto.

Tiu ĉi literatura esearo el la majstra plumo de la jus mortinta autoro donas al ni kritikan bildon pri tiuj verkoj, kiujn nuntempe ni nomas klasikaĵoj de la originala literaturo.

18 cm., 121 p. Prezo: 12,— ned. gld. Mendu ĉe la Libroservo de UEA aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio.



Jen, cito el tiu ĉi Biblio: »... **20. Sur Vilhelmo B... en Budapeŝto estas mia beno. Li ne erarkondukos vin. 21. Fidela gardanto kaj protektanto de miaj plej lertaj plumoj li estas — fidu al li.**« Ne hezitu tuj aĉeti tiun ĉi spritan primovadan satiron! (Ĉi tiun reklamon redaktis: **Vilhelmo B...**)

18 cm., 80 p., Prezo: 8,10 ned. gld. Mendu ĉe UEA aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio.

LETERKESTO

Pastro Hansjörg Kindler (Trixini), Luksemburgo: ankaŭ ni aprezas la lertan agadon de E-Centro Luksemburgo por diskonigi la IL-n helpe de *influhavaj personoj*, resp. instancoj. La kolorfilmon pri la granddukdomo, sinkronizitan per Eo, oni ĉie atendos avide; same grava sukceso instigi la *„Bleicher-Verlag"* eldoni plu librojn pri kaj en Eo, post la grandsukcesa *Trigroŝa romano* de Bertold Brecht. Ni deziras — kaj certas — pri novaj viaj sukcesoj.

Zdenek Hršel, CS, Brno: la malfeliĉa malfruo de la ĉi-jara nro 1. bedaŭrinde okazigis plurloke konfuzon pri nia plua apero, tamen, videble, HV jam reatingis sian kutiman aper-ritmon. Dum via publika prelego, utiligi la gravan intervjuon de ministro *Polinszky* kaj la informojn pri TUCEG, montriĝis celtrafa — dankon pro via sciigo. — Prava rimarko, ke „ne bezonas citi ekzemploj" estus pli ĝusta, ol „ne devas citi" (p. 3.): La prefero por *„devas"* fontis en hungarismo, same kiel sur p. 17. la uzo de *„pretendi"*, kion rimarkis s-ano *Lentaigne* (Montpellier). La anoncanta fabriko memkompreneble liveras „laŭdezire", „laŭ mendo de la aĉetanto", „kiel plaĉas", kaj *ne* kiel „pretendas" la aĉetanto. Temas pri modiĝinta vorto en la nuntempa hungara ĵurnalismo. Ni dankas al vi pro la rimarkoj.

V. V. Grigorenko, SU, Poltava: vekis nian intereson via informo ke la *urba* E-klubo iĝis jam „regiona", sekve de viaj organizaj sukcesoj; ke rezidante en la sindikata kuturpalaco, ties estraro plene subtenas vian klubon ankaŭ per mono, eĉ instigis vin organizi en julio grandsukcesan E-renkonton por Poltava-regiono, invitinte multajn gastojn el aliaj landpartoj. Estas dezirinde, ke tian eblecon — oficiale propagandi E-on fare de subtenata klubo — akiru ankaŭ aliaj en via lando, kiel E-kluboj de Internacia Amikeco. Ni konsentas kun Vi, prezidanto de PREK, ke ekspozicioj pri korespondaĵoj ricevitaj el multaj landoj povas grave helpi al kluboj, atingi „oficialiĝon" de rekonitaj organizaĵoj.

D-ro J. Hamvai kaj edzino, Nov-Zelando, Auckland: vi sendis tra la plej granda tera distanco varman konfeson al la „karega Hungarlando", kiun vi estas espereble vizitontaj. Korajn bondezirojn al vi! Kiel vi amike deziras: ni klopodas resti daŭre standardportantoj en la movado.

Juszas *Lazauskas*, SU-Litovio: „Inter du horizontoj" (HV 78/1, p. 37) bezonas — kiel ĝenerale la nefacilaj legaĵoj —, kelkajn relegojn por plena kompreno. Poste vi rimarkos, ke nenia absurdaĵo troviĝas en ĝi; eble pro la formo, monologo de ŝipveturanto ŝajnas stranga, ĉar ĝi enhavas diversajn rakontetojn, erojn de trankvilon ne trovanta animo, kiu fuĝas inter horizontoj sur oceano. Bedaŭrinde ensteliĝis preseraroj: vo-on (— vojon), — onoron (sonoron), povra pano (panjo). La fremdvorto *week-end:* semajnfino; „infinitezima": senlima malgrando (PV); „ventrodancistino" uzas orientan arton. Oni bezonas foje konsulti leksikonon, fremdvort-liston, se renkontas nekonatan vorton, nocion. — Ankaŭ al ni „ne estas klara" kial estas grave, ke *Gárdonyi* (elp. gardonji), aŭtoro de „Sklavoj de Dio", jesas aŭ ne la vivon de mezepokaj monakinoj; tutcerte li ne sekvis tiun modelon. En arta rakonto aŭ priskribo la aŭtoro ofte ne emfazas rekte sian prijuĝon, taksadon. Verko kompletiĝas ja nur helpe de la akceptanto, de la *leganto:* en lia spirito devas maturiĝi la elvokitaj bildoj kaj pensoj, sekve *li* juĝos super la aferoj prezentitaj en la verko. Se la leganto ne kapablas prijuĝi, tion kaŭzas eble mankoj de la verko, eble nesufiĉa reeĥo aŭ kompreno ĉe la leganto. Koran saluton!

Korespondi deziras

S-ino Urszula *Sigda* (23) medic. laborulo kun samaĝuloj ktm: turismo, muzika, bk, E-stampoj, vojaĝo (reciproke). PL—27—200 *Starachowice*, ul. Zachodnia 1/55. — Rumen *Dimitrov* (31) fraŭlo kun gejunuloj E, angle, germane: sporto, muziko, ekskursoj, lingvoj, — BG—1504 *Sofio*, D. Poljanov nro 1. — S-ino Nina *Alekseenko* (29) sporto, turismo, SU—660041 *Krasnojarsk*, str. Kurĉatova 4/30. — Petro *Butorin* (24) historio, medicino, naturo, SU—660028 *Krasnojarsk*, str. Svobodnij 63—13. — Adam *Górski* (2) instruisto, ktm, liter. mod. muziko, turismo, sporto, recipr. gastigado, teatro, kino. Interŝ. pm. bk. — PL—56-400 *Olesnica*, ul. 15-go Grudnia 31m3, woj. Wroclaw. — José *Anaya* teknikisto terkultura, Venezuelo, *Caracas* 104, Apartado 40377. — Lionel *Marin* studento pri sociologio, kinoarto, pm, Venezuelo, *Caracas*, Apartado 76.626 — S-ino Ludmila *Kostjakova* (25) ktm, pĉt, SU—660069 *Krasnojarsk* str. Moskovskaja 5—50. — Nina *Brodin* (29) ktm. pĉt. SU—660079 *Krasnojarsk*, str. Paraŝutnaja 78—100. — Zdzislaw *Chelstowski* (19) elektroteknikisto. studento pri mod. muziko, sporto, vivmanieroj, kol. E-eldonaĵojn bk, PL—73-110 *Stargard* ul. Platnerzy 303. — Lehho *Jõumees* (23) instr. de fiziko, astronomio, pĉt, fremdlingvoj, Estonio, SU—202020 *Kohtla-Järve*, str. Kalevi 35—93. —

S-inoj (18) ktm, pĉt. en Estona SSR, SU—20202 *Kohtla-Järve:* Katrin *Mey*, str. Katse 11—53. — Ülle *Pöldmaa*, str. Katse 5—13. — Tün *Tsernant*, str. Staadioni 1—1. — S-ro Efrain Labana *Cordero*, pri libroj: Libreria Caribe, Universidad Central, Fac. de Ciencias, Venezuelo, *Caracas*. — Valentina *Fedoseeva* (24) literaturo, lingvoj, SU—660113 *Krasnojarsk*, str. Juŝkova 44—61. — Valentina *Ivanova* (29) literaturo, turismo, SU—660100 *Krasnojarsk*, str. Truda 148—1. — S-ino Gulja *Jusupova* (26) sporto, SU—660058 *Krasnojarsk*, str. Lomonosova 94/a, 328.

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H—1368 Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 48,— al eksterlando krome Ft 9,60 por afranko. * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,—Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. *78-7114 Somogy megyei Nyomda Responda gvidanto: Béla Farkas, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

PANNONIA



Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS ĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ĜANGEBLA

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért

Konsumturist